

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 567 (2) FEBRUARO 1953



(foto : *East Anglian Daily Times*)

Internacia festo de kandeloj (*vidu paĝon 59*)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono (1953) : 15 ŝil. anglaj (kun
membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅙ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 6000



Enhavo

Specialaj artikoloj :	paĝo
Ek al slava sudo en 1953 ! <i>Hans Jakob</i>	49
Lastatempaj eksperimentoj pri Esperanto en lernejoj : <i>V. C. Nixon</i>	56
Internacia festo de kandeloj : <i>J. Heath</i>	59
Mason Stuttard—50-jara : <i>Bo-Bo</i>	64
Kio estas disciplino ? <i>M. Stuttard</i>	67
Canberra : <i>W. S. Kent Hughes</i>	69
Konduto de seksĉeloj de Chlamydomonas : <i>R. A. Lewin</i>	73
Moderna fabelo : <i>M. Lewin</i>	75
Silenti kaj Paroli : <i>D-ro J. C. A. Fetter</i>	76
Belartaj Konkursoj de U.E.A. : 1952 : Poezio originala	54
Poezio : Dediĉa diro : <i>Karl Vanselow</i>	50
38a Universala Kongreso :	
Oficiala Komunikilo N-ro 3	61
Perŝipe laŭ la Adriatika marbordo : <i>L. Borĉić</i>	62
Konstantaj Rubrikoj :	
Centro de Esploro kaj Dokumentado	52
Enigma Konkurso	77
Internacia Konkurso	51
Oficiala Informilo	79
Radio kaj Esperanto	78
Tra la Libraro	65

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 567 (2)

Februaro 1953



Ek al slava sudo en 1953 !

POR la unua fojo la Universala Kongreso de Esperanto okazos preskaŭ sur Balkana Duon-insulo ; granda parto de Jugoslavujo apartenas ja al ĝi. Ofte oni diskutis la eblecon okazigi kongreson en unu el la balkanaj landoj, kie Esperanto *estas* movado. La cirkonstancoj estis ĉiam pli fortaj ol la bona volo de decidantaj organoj. En 1953 la Esperantista Meko estas Zagrebo, ĉefurbo de la Kroata Respubliko.

Jugoslavujo, t.e. la lando de la sudslavoj, estas vere mozaiko de gentoj kaj religioj. La lingvoj parolataj, la kroata, la serba, la slovena kaj la makedona, por nomi nur la slavajn, estas sufiĉe similaj, sed ili ne formas la ĉefan unuigan elementon de la gentoj vivantaj en Jugoslavujo. Ĉiu el ili konis jarcentdaŭran subpremon, kiu variis de perforta sistema sennaciigo ĝis la pli milda formo de nura teritoria enkorpiĝo en alian regnon kun minimumo de memregado.

Klarvidaj sudslavoj ekkomprenis tiun ĉi dependecon de nombre malpli forta popolo vidalvide al pli forta najbaro kaj la konkludo estis : Unuigitaj ni eltenos, dividitaj ni pereos. La postsignoj de la estinta fremdregado konstatigas ankoraŭ nun kaj estas parte ili, kiuj igas Jugoslavujon la plej pitoreska lando en Eŭropo.

La diverseco de regadsistemoj, de religioj kaj de geografiaj elementoj ekstreme komplikigis la unuecigon de ĉi-tiuj landoj post la milito 1914-1918. Teoriulo pri ŝtata organizo dirus, ke nur federacia formo laŭ formulo "interne pluraj, ekstere unu" taŭgas, por harmonie evoluigi tian mozaikon. De post 1918 estis pluraj provoj solvi kontentige la ardan problemon de kunvivado. Unue organiziĝis la ŝtato en formo de Reĝlando de serboj, kroatoj kaj slovenoj kun akcentita ĉefrolo de la serba elemento. Poste okazis la forigo de la naciaj nomoj el la ŝtata titolo kaj ilia anstataŭigo per geografiaj (riveraj) nomoj ĝis la nuna formo, la federacia respublikaro. La siatempa provo ekstermi la antagonismojn kreante arbitre provincojn ("banovinojn") laŭ nomoj de riveroj Savo, Dravo, Dvino, Moravo, Zeto k.a., memorigas analogiaĵon francan. La revolucio de 1789 anstataŭigis la nomojn de la francaj provincoj per tiuj de riveroj aŭ montaroj, la konataj departementoj.

Jugoslavujo fariĝis post 1919 celo turisma. Tero ankoraŭ freŝa, ne plugita kaj ekspluatita de la moderna vojaĝado, lokoj ankoraŭ memorigantaj koloran orienton, turkaj bazaroj, vualitaj virinoj, moskeoj, postsignoj romaj, veneciaj, laŭlonge de la Adriatiko, urboj neniel diferenc-

iĝantaj de la mezeŭropaj, mozaiko de naturo, homoj, pasinteco, vivmaniero. Parolante pri la homoj, ni ne povas ne menci la specialaĵojn en manĝado, eltrovitajn de ili. Frandaĵoj el mielo, nuksoj, sukero, suko de rozfolioj, konataj ankaŭ en aliaj balkanaj landoj (Halva, Rahat-lokum, Baklava, Nugat k.a.) allogas amantojn de dolĉaĵoj. Farunaĵoj ĉiaspecaj, inter ili la “Palaĉinko” konata jam ekde Vieno tra tuta Balkano. Fruktoj trempitaj en siropo tre densa estas specialaĵo serba (sladko) prezentata al la gasto en la serba hejmo kun la nigra kafo en etaj tasoj.

Viandmanĝemuloj konatiĝu kun la “ĉevabĉiĉ’oj” (turke: kebab), t.e. viandpecoj rostitaj super libera fajro, aŭ kun slovenaj “klobas”, kolbasetoj kaj aro da aliaj specialaĵoj, preparitaj el porka kaj ŝafida viando. Por kompletigi tiun ĉi gastronomian ekskurseton estu menciitaj ankoraŭ kelkaj legomspecialaĵoj. Estas la regionoj, kie forte spicitaj manĝaĵoj estas kutimaj. Ruĝa papriko, tomatoj, ajlo, estas eroj de tre multaj manĝaĵoj, inter ili la bonega “Sarma” kaj “Musaka”.

Inter la fruktoj unu estas preskaŭ “nacia”, nome la pruno (ŝljiva). El ĝi estas farata la “ŝljivovico”, forta brando, simila laŭ preparo kaj uzo al la “Kirsch” (ĉerizo) en okcidento. La sekigitaj prunoj el Bosnio estas valora eksportaĵo. La amantoj de melonoj profitas la okazon, ĉar ĉie oni servas ilin, ne kiel enirmanĝon, sed kiel deserton kun sukero. Ne miru vidante infanon antaŭ giganta “pasteko”, reĝa akvomelono, vera regalaĵo dum somero.

Kontrastriĉa lando kia estas Jugoslavujo el vidpunktoj geografia, historia kaj etnika, estas ankaŭ trezorujo de naturbelaĵoj ekster-

ordinaraj. La grandega grotaro de Postojna ĉe landlimo itala kun subteraj lagoj, la Plitvica lagaro, la klasika marbordo dalmata, la grandioza Kotor Golfo (Boka Kotorska, Bocche di Cattaro) kun la minacanta Lovĉen, la ĉefo de la Nigra Montaro (brna Gora, Montenegro).

Tiun ĉi landon ni do vizitos. Ni estos bonvenataj de la tieaj esperantistoj kaj de la loĝantaro. Ni venos en landon, kies popolo deziras esti libera kaj kiu akiris sendependecon post pluraj offeriĉaj militoj.

En tuta orienta Eŭropo nia movado renkontas opozicion fare de la regantaj rondoj. Unu lando post la alia eliris nian rondon. Jugoslavujo estas la sola el sudorientaj landoj kun atentinda Esperanto-Movado. Ni kuraĝigu niajn jugoslavajn samideanojn per multnombra partopreno je la 38-a Kongreso. La jugoslava Esperantistaro estas avangardo de nia afero en orienta Eŭropo.

Hans Jakob.

Dediĉa diro

(Al Universala Esperanto-Asocio)

*Ne povas mi subteni vin per mono.
Kruela sorto faris min malriĉa.
Sed se ĉi tiu tre modesta dono
Kun mia diro kora kaj dediĉa
Vin iom plaĉi kaj ĝojigi povas
Kaj vi ĝin taŭga por utili trovas,
Sciigu, ke por kunlabor' poeta
Mi ankaŭ plue ĉiam estos preta.*

*Grava tasko staras antaŭ vi.
Helpu ĉiu kun fervoro
Ke sukcesu ĉiam pli
Via multvalora plulaboro.*

Karl Vanselow.

(El “Nia lingvo Esperanto”, unua kajero)

La Internacia Konkurso

ANKAŬ en 1952 estis multe da intereso tra preskaŭ la tuta mondo pri tiu konkurso, kun ĝia amika konkurado inter diversaj landoj. Eble la plej trafa konstato estas la fakto, ke malgraŭ la plialtigataj kotizoj pli ol duono de la landoj partoprenintaj sukcesis atingi siajn kvotojn kaj pli ol tri kvaronoj atingis 90%. Jen la finaj ciferoj:—

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Brazilo ..	4500	7093	157.6
2. Izraelo ..	350	495	141.4
3. Maroko ..	500	645	129.0
4. Norvegujo ..	1700	2127	125.1
5. Hispanujo ..	1300	1505	115.8
6. Italujo ..	2200	2475	112.5
7. Aŭstralio ..	850	935	110.0
8. Nov-Zelando ..	800	880	110.0
9. Kanado ..	250	270	108.0
10. Islando ..	400	430	107.5
11. Svedujo ..	5200	5490	105.6
12. Svislando ..	1400	1450	103.6
13. Urugvajo ..	250	255	102.0
14. Germanujo ..	3200	3255	101.7
15. Japanujo ..	900	905	100.6
16. Sud-Afriko ..	300	290	96.7
17. Belgujo ..	2300	2199	95.6
18. Nederlando ..	4800	4547	94.7
19. Francujo ..	5500	5130	93.3
20. Danlando ..	2700	2485	92.0
21. Usono ..	2500	2293	91.7
22. Britujo ..	12000	10550	87.9
23. Finnlando ..	2600	2125	81.7
24. Aŭstrujo ..	1000	765	76.5
25. Kubo ..	250	185	74.0
26. Portugalujo ..	800	580	72.5
27. Irlando ..	250	170	68.0

Brazilo denove venkis kaj ni kore gratulas al ĉiu tie kiu helpis atingi tiun vere mirigan rezulton. La sekvantaj ciferoj montras la kreskon:

	1951	1952
AM	711	1638
MJ	86	200
MA	277	286
MS	39	73
Patronoj	1	2
DM	11	19
HM	1	1
	<u>1126</u>	<u>2219</u>

Sekve Brazila Esperanto-Ligo denove ricevos premion £10 kaj diplomon, kaj ĉiu delegito tie ricevos libropremion. Gratulon ankaŭ al Maroko, kiu denove okupas indan lokon, malgraŭ ĉiujare plialtigitan kvoton.

Simila konkurso okazos en 1953. La aljuĝo de poentoj estos kiel antaŭe: AM 1; MJ 5; MA 10; MS 15; Patrono 50; nova dumviva membro 50. La Landa Asocio en la lando kiu plej bone sukcesos ricevos premion £10 kaj diplomon, kaj ĉiu delegito en tiu lando ricevos libropremion. Jen la kvotoj por 1953:—

Argentino ..	500	Japanujo ..	900
Aŭstralio ..	900	Jugoslavujo ..	1500
Aŭstrujo ..	800	Kanado ..	300
Belgujo ..	2200	Kubo ..	250
Brazilo ..	6500	Maroko ..	600
Britujo ..	10000	Nederlando ..	4600
Danlando ..	2500	Norvegujo ..	2100
Finnlando ..	2200	Nov-Zelando ..	900
Francujo ..	5200	Portugalujo ..	600
Germanujo ..	3200	Sud-Afriko ..	300
Hispanujo ..	1500	Svedujo ..	5500
Irlando ..	250	Svislando ..	1450
Islando ..	450	Urugvajo ..	250
Italujo ..	2400	Usono ..	2300

Verdire ĉiu membro devus havi intereson en la nuna konkurso. Jam ni dissendis du numerojn de *Esperanto* kun po 48 paĝoj, kaj se en la nuna jaro ni povos varbi mil novajn membro-abonantojn tio signifos, ke ni povos eldoni ĉiun numeron laŭ tiu amplekso. La sukceso ĉe Unesko devus esti forta antaŭenpuŝo por la tuta movado, kaj la iniciato restas ĉe la landaj asocioj, ke ili ekspluatu la novan situacion por atingi aŭ superi siajn kvotojn.

C.C.G.



Centro de Esploro kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6. Anglujo

Unu Artikolo en 105 Gazetoj kaj Revuoj

La artikolo de la honorofica Direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado sub la titolo "UNESKO diskutas pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj" aperis, laŭ la ĝis nun ricevitaj informoj, aŭ komplete aŭ en iom mallongigita formo, en jenaj lingvoj :

(1) **Esperanta** en la gazeto "Heroldo de Esperanto" (16.XI.) ;

(2) **Itala** en 13 gazetoj kaj revuoj, plejparte sendependaj, inter kiuj la grandaj gazetoj "Il Giornale della Sera" (15.XI., titolo super ses kolonoj), "Corriere Mercantile" (18.XI., titolo super kvar kolonoj), "Messaggero Veneto" (22.XI., titolo super tri kolonoj), "Il Corriere di Catania" (26.XI., titolo super tri kolonoj), "L'Avvenire del Mezzogiorno" (6/7.XII, titolo super tri kolonoj, unua paĝo ;

(3) **Sveda** en 34 gazetoj, inter kiuj "Trelleborgs Allehanda" (15.XI., titolo super du kolonoj), "Hallands-posten Halmstad" (24.XI., titolo super du kolonoj), "Nordsvenska Dagbladet" (20.XI., dika titolo super du kolonoj), "Östgöten" (26.XI., dika titolo super tri kolonoj), "Värmslands Folkblad" (15.XI., titolo super tri kolonoj) ; krome, la Sveda Telegram-oficejo sendis kvinlinian informon al ĉiuj svedaj gazetoj ;

(4) **Germana** en 30 svisaj gazetoj inter kiuj en la tre grava "Neue Berner Zeitung" (13.XI.) kaj en "Schweizerische Bodensee-Zeitung" (22.XI., titolo super du kolonoj) ;

(5) **Germana** en la plej granda kaj plej grava saarlanda taggazeto "Saarbrücker Zeitung" (8.XI., titolo super tri kolonoj) ;

(6) **Franca** en 2 taggazetoj, nome en "Nord Eclair" (9.XI., titolo super kvar kolonoj) kaj "Nord Matin" (12.XI., titolo super tri kolonoj) ; krome, en unu el la plej grandaj francaj gazetoj "Le Figaro" aperis raporto pri la Debatvespero en Esperanto okaze de la UNESKO-Konferenco (19.XI., unua paĝo) ;

(7) **Angla** en 2 gazetoj, nome "The Nottingham Guardian" (2.XII.) kaj "Newcastle Journal" (6.XII.) ; krome, okaze de la prelego de Prof. Lapenna en Bournemouth pri la rezulto atingita ĉe UNESKO, aperis longa artikolo en "Bournemouth Daily Echo" (29.XII.) ;

(8) **Hispana** en la plej granda gazeto de Kanariaj Insuloj "La Tarde" (12.XI., tre granda titolo super kvar kolonoj) ;

(9) **Portugala** en la granda gazeto "Republica" (14.XI., titolo super du kolonoj) ;

(10) **Serba kaj Kroata** en 3 gazetoj kaj revuo, el kiuj en la tre grava junulara gazeto "Omladinska Riječ" (29.XI., titolo super tri kolonoj) kaj en la granda revuo "NIN" (23.XI., titolo super kvar kolonoj) ;

(11) **Nederlanda** en 17 gazetoj kaj semajnaj revuoj, inter kiuj "Oost Brabant", "Eindhovenens Dagblad".

La artikolo, do, entute aperis en 10 lingvoj, en 10 landoj, en 105 gazetoj kaj revuoj, el kiuj multaj apartenas al la plej gravaj de la koncernaj landoj. Tre verŝajne ankaŭ en aliaj landoj aperis artikoloj pri la temo, sed bedaŭrinde ni pri tio ne estas informitaj.

Por tiu ĉi vere bonega sukceso—la plej rimarkinda, kiun iam havis nia Movado sur tiu kampo—grandan meriton havas la gazetaraj servoj de niaj landaj asocioj, precipe la sveda kaj itala, kiuj perfekte funkcias; la kunlaborantoj de CED, kiuj tradukis la artikolon en bonegan nacian lingvon; ne laste la novaj formoj de nia aktiveco kaj, sur ĝia bazo, de intima kunlaborado sur la kampo de sciencaj esploroj, dokumentado kaj informado en la kadroj de UEA.

Al ĉiuj kunlaborintoj koran dankon.

Novaj studoj de kunlaborantoj de CED

La kunlaboranto de CED Sinjoro *Pierluigi Marelli* ellaboris tre dokumentitan studon pri la problemo de teknikaj vortaroj.

La kunlaboranto de CED *D-ro O. Reiersol*, docento en la universitato de Oslo, trastudis la problemon pri la publikigo de sciencaj artikoloj en Esperanto.

La kunlaboranto de CED *D-ro M. Wajsblum* sendis al la Centro ampleksan studon pri la nuna stato sur la kampo de interlingvistiko kaj detalan raporton pri la Esperantaj libroj en Index Translationum, kiun nun eldonas UNESKO.

La kunlaboranto de CED Sinjoro *W. Auld* ĵus finis la bibliografion pri la Esperantlingvaj publikaĵoj en la jaro 1952.

La supraj studoj kaj raportoj, kune kun la aliaj, pri kiuj jam disponas CED, estas utiligataj por kunmetado de dokumentoj, kiujn la Centro

sendas al diversaj neesperantistaj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj. Mallonga resumo el la Bibliografio de Sinjoro Auld por la jaro 1952 aperos en la Marta numero de *Esperanto*.

Donacoj al CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 8-an de Decembro ..	49	7	0
Esperanto societo Bournemouth okaze de prelego de Prof. Lapenna pri la sukceso ĉe UNESKO	5	0	0
N.N., Anglujo	5	0	0
F-ino N. Hanson, Anglujo ..	3	0	0
Prof. H. Rissom, Germanujo ..	8	6	6
Reĝa Belga Esperantista Ligo, Belgujo	2	10	0
Stato la 7-an de Januaro 1953	£68	8	6

La donacojn por CED oni povas sendi al UEA en Heronsgate, Rickmansworth (Herts.) aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris, X., aŭ al la Centro mem.

Sveda Somera Semajno

estas la nomo de internacia somera kurso en la plej suda parto de Svedujo —la idilia Frostavallen de Höör.

La temo de la prelegoj ĉijare estos “Internacia kulturinterŝanĝo”, kaj en la programo oni trovos la aktualan UNESKO, krome: La rolo de la scienco por la kultura evoluo, La mondfederalista movado, Manieroj aranĝi vojaĝojn al eksterlando por akceli larĝan internacian percepton (kun diskuto), Komparo inter orienta kaj okcidenta kulturoj, k.t.p. Prelegos: Prof. Ivo Lapenna, S-ino J. Isbrucker, Karl Söderberg kaj aliaj.

Petu informojn ĉe Jan Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo por ricevi sciigojn pri la restadkosto k.t.p. Por ne-svedoj ekzistas eblecoj peti subvencion por la veturelspezoj. Ĉar la nombro de litoj estas limigita, oni devas sin anonci **antaŭ la 1-a de marto 1953**. Sveda Esperanto-Instituto aranĝas la semajnon.

Belartaj Konkursoj 1952: Poezio Originala

Al malfruaj solenontoj ricevis la 1-an premion; En Arbaro la 2-an

Al malfruaj solenontoj de la Tago de Rememoro

(11a Novembro)

*Rapidu, gesinjoroj!—tamen digne,
ombrel-svingante, kaj kun sobraj trajtoj,
tenante la bibliojn virtinsigne.*

*Vi iras nun diservi, ĉar la rajtoj
pri preĝo kaj bonton' ankoraŭ restis
post la mortintoj; pensi kiel tajdoj*

*de juno, forto, belo manifestis
imponon de la ŝtato, kiam ili
pelate sub la fera hajl' tempestis*

*tra koto, karno, putro por akiri
prestigon, kaj sekuron por futur'.
Futuras nun, kaj tial decas iri*

mediti tion—du minutojn nur.

John Francis.

En Arbaro

*Vi tra arbaro iras nun
gvidata de la nazopinto.
Kaj pendas super labirinto
lantern' unika: pala lun'.
Kaj perlas ŝvit' sub pelerin'
Ĉu lup'? Fantomo? Nur imago?
Jen aŭdu: Dum erarzigzago
embuske iu sekvas vin
Konsterne vibras mort-intrig'
el flug' susura de vesperto
En for' ululas kun averta
funebro pro profetanta strig'*

*Kastelo staras en proksim';
ĉielon tranĉas la konturo
de forlasita nigra turo,
ne loĝas tie homanim'.
Horloĝ' ekbatis per si mem—
Naĝante super kastelruboj
la lunon kovris grizaj nuboj
kaj ĉiu bat'—eltomba ĝem'.
Vi timas pro la noktomez':
Aperos lum, en tura truo,
tambure klakos ostobruo,
skeletoj dancos en frenez'.*


*Kaj vere—cedas la krepusk'.
arbar' vekigas el medito.
Purpure fajras amanito
en freŝe aspergita musk'.
Ornamas branĉojn perloj mil
kaj ŝpinas inter la piceoj
arĝentajn retojn araneoj,
vin akompanas birda tril'.
Arbaro vivas . . . Kun persist'
fagtrunkon garde frapas pego.
Kioma zorgo, kia flego
de la arbara kuracist'!*

*Vi haltas gape pro surpriz':
Sin fleksas ritme herba molo
sub la hufet' de kapreolo
Domage! Glutis ĝin kulis'
La lastan pinetaĝon ĵus
sciur' atingis akrobate.
Bivakas vi por miri flate,
sed vane petas pri konus'.
Vi sidas, eta hompigme',
rigardas supren al la alto—
Subite ve! Risorta salto!
Formikoj marŝas en arme'!*

*Okazu tamen kio ajn,
ne lasu ŝoki vin, vaganto,
la disonancoj de l'nokt-kanto
montriĝos baldaŭ trompa ŝajn'.
Vin la unua sunradi',
ankoraŭ nana, malkuraĝa,
denove faros sobre saĝa,
eĉ ridos vi pri l'komedi'.
Jes, mokos vi pri l'mortbrakum' :
Vi ja ne estas timemulo !
Al dorm' sin sternos en nebulo
fantomoj monstraj de mallum'*

*Mirteloj dolĉaj, fraga kamp'
konvenas al la apetito.
La sun' rapidas al zenito
brulante kiel granda lamp'.
Varmega tago ! Kun diskret'
murmuras akvo en filikoj.
Eksvingis io sur silikoj :
Kolubron portas riveret'.
Vi ĝin postvadas kun envi',
ĝis panoram' de regiono
en la kvieta monotono
etende vastas antaŭ vi*

Eli Urbanova.



John Francis



Eli Urbanova



MAJSTROVERKO DE LA MONDLITERATURO

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., afranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe

U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

F-ino V. C. Nixon :

Lastatempaj eksperimentoj pri Esperanto en lernejoj

LA valoro de Esperanto, kiel enkonduko al la lernado de nacia lingvo, estas flankafero, tamen ni Esperantistoj mem respondecas pri la pretendo, ke ĝi bone helpas tiurilate, kaj se la instruado de Esperanto okazus dum la unua jaro en la gimnazio la progreso poste en la fremda lingvo studata (por la angloj plejparte la franca) estus des pli bona.

Eksperimento 1. En novembro, 1952, *The British Journal of Educational Psychology* publikigis raporton de J. H. Halloran, lektoro pri edukado en la Universitato de Sheffield, titolitan "Kvarjara Eksperimento pri Esperanto, kiel Enkonduko al la Franca Lingvo". Li priskribis seriozan, objektivan enketon.

La lernejestro en norda provinca gimnazio volonte kunlaboris; Esperanto jam estis temo en la lerneja programo. En 1947 la tuta novlernantaro, 120, estiĝis la materialo por la eksperimento. Post testoj (a) pri inteligento, (b) pri vortkapablo, oni dividis ilin en kvar grupojn, tiel ke la pli intelligentaj (I) estis en klasoj 1A kaj 1B, kaj la malpli intelligentaj (i) en 1C kaj 1D. Notu, ke la cifero "1" signifas la plej junan klason en la gimnazio, proksimume 11-jaruloj. La plej bonaj laŭ vortkapablo "V" en la du altaj klasoj iris en 1A kaj la malpli bonaj "v" en 1B. En klasoj 1C kaj 1D oni miksis la gelernantojn, tiel ke la du klasoj estis kiel eble plej egalaj. Do, jen la personeco de la klasoj :—

1A (IV—alta inteligento kaj alta vortkapablo) ;

1B (Iv—alta inteligento kaj malpli alta vortkapablo) ;

1C (iV plus iv)—malpli alta inteligento, sed alta kaj malalta vortkapabloj).

1D (iV plus iv)—malpli alta inteligento, sed alta kaj malalta vortkapabloj).

1A (IV) kaj 1D (iV plus iv) komenciĝis per la franca lingvo ; 1B (Iv) kaj 1C (iV plus iv) komenciĝis per Esperanto. Post la unua lerneja jaro la Esperantistoj ĉesis la lernadon, kaj komencis la francan lingvon. Ili ricevis la saman nombron da franc-lingvaj lecionoj, kiel la aliaj. Ek de la dua jaro, ĉiuj gelernantoj daŭrigis sian vojon tra la lernejo laŭ ĝenerala progreso ; do en la dua, tria kaj kvara jaroj, Esperantistoj kaj ne-Esperantistoj estis en ĉiu el la 4 klasoj :— A, B, C, D.

Post kvar jaroj restis 86 gelernantoj el la 120—40 Esperantistoj kaj 46 ne-Esperantistoj. La verkinto de la artikolo (kiu mem estas ekzamenisto por la oficiala abiturienta ekzameno) ekzamenis ilin en la franca lingvo per 11 testoj, laŭ jam uzitaj metodoj.

La unua impresoj gajnita de la fina laŭranga listo estis, ke ne estas multe da diferenco inter la Esperantistoj kaj la ne-Esperantistoj. Kvar el la plej altaj estas Esperantistoj, sed ankaŭ 8 el la plej malaltaj. En la supra duono de la listo (43 gelernantoj) 22 estas Esperantistoj, sed la ĝenerala

meza rango de tiuj, kiuj komenciĝis per la franca lingvo estas 1.6 pli bona ol tiu de la Esperantistoj (40-41.6).

Komparante C kaj D, kiuj estis egale miksitaj, C (Esperanto) pli bone sukcesis ol D en 8 el 11 testoj. En C ankaŭ tiuj kun malpli alta vortkapablo iomete superis tiujn kun pli alta vortkapablo.

La verkinto diras, ke estas malfacile eviti la konkludon, ke por tiuj kun la malpli alta inteligento, estas pli saĝe komenciĝi per Esperanto, eĉ pli se vortkapablo mankas al ili. Kontraŭe li trovas, ke, komparante A kaj B, la A klasanoj en 10 el la 11 testoj pli bone sukcesis ol la B klasanoj, kaj post plua rezonado li opinias, ke por la plej intelligentaj gelernantoj estas pli bone komenciĝi rekte per la franca lingvo. Plue li konstatas, ke 5 el la 11 testoj postulas scion pri la lingvo, kaj la aliaj 6 pli bone montras la kapablon aktive uzi la lingvon. La Esperantistoj, kiel grupo, pli bone sukcesis en la 5 testoj; la ne-Esperantistoj en la 6.

Resume do, S-ro Halloran konkludas, ke ĉe la malpli intelligentaj lernejoj tiuj, kiuj dediĉis unu jaron al Esperanto pli bone sukcesis en la franca lingvo je la fino de 4 jaroj, sen pli da tempo por la franca dum la 3 jaroj. La pli intelligentaj lernejoj tamen pli bone sukcesis en la franca lingvo se ili komenciĝis per tiu lingvo.

Tiuj, kiuj komenciĝis per Esperanto havis pli bonan "pasivan" scion, kaj tiuj, kiuj komenciĝis per la franca lingvo akiris pli bonan "aktivan" uzadon. Li emfazis tiujn du aspektojn de lingvo-lernado.

Komentoj jam venis de Esperantistaj instruistoj, kiuj legis la raporton, kaj ne estas konvinkitaj de la konkludoj. Ĉefe oni rimarkigas ke la sukceso en la franca lingvo ja estas

rimarkinda post nur tri jaroj anstataŭ kvar. Oni ankaŭ emfazas, ke la manko de unu jaro povus forte influi la ekzercadon de la lingvo, precipe ĉar ŝajne la Esperantistoj devis komenci la francan lingvon en la dua jaro de la studkurso por la aliaj. Oni ankaŭ ne supozu, ke ili restu malsuperaj laŭ aktiva uzado. Por juĝi juste cetere, oni devus dividi kaj kompari tiujn, kiuj estas egalaj kaj laŭ alta vortkapablo kaj laŭ alta inteligento.

Eksperimento 2 okazis en alispeca lernejo, Duagrada Moderna Lernejo, kiu fakte estas la ŝtatlernejo por 11-15 jaruloj, kiuj ne estas akceptitaj en la gimnazioj kaj la fakaj lernejoj (komerca, teknika, k.t.p.) La plejparto el la lernejoj vizitas tiujn lernejojn.

Kompreneble la Inteligento-Kvociendo estas malpli alta. Kiam oni parolas pri A, B, C fluoj, tio signifas la gradigon de samaĝuloj en paralelaj klasoj laŭ inteligento. Kutime oni ne instruas fremdan lingvon, sed multaj provas.

La koncerna lernejo ankaŭ situas en norda provinco, kaj estas por geknaboj.

En Septembro, 1948, la klasoj de la B fluo ricevis kiel eble tiom da tempo por Esperanto, kiom ricevis la A fluo por la franca lingvo, nome 5 periodojn de 40 minutoj ĉiusemajne. La klasoj enhavis po 40 gelernantoj. Estas notinde, ke la gradigo de la geknaboj en tri fluojn A, B, C baziĝas sole sur du ekzamenoj pri ĝenerala scio de la angla lingvo.

La instruistoj pri Esperanto ambaŭ estis lernantaj private kaj komencis instrui post malmultaj tagoj de studo. Unu ankaŭ instruis la francan lingvon. Tri diplomitoj (kun honoro) instruis



Foto laŭ afabla permeso de *North Cheshire Herald*
Lernantoj de Denton County Secondary School
survoje al TEJO-kunveno en Ry, Danlando

la francan lingvon, el kiuj nur unu interesiĝis pri Esperanto.

Je la fino de la lerneja jaro, Julio, 1949, oni provis komparon. En la A klasoj la lernado de la franca lingvo jam daŭris por la 11-12 jaruloj UNU jaron; por la 12-13 jaruloj DU jarojn; por la 13-14 jaruloj TRI jarojn; por la 14-15 jaruloj KVAR jarojn.

En la B klasoj la lernotempo por Esperanto estis UNU jaro, krom por la 14-15 jaruloj, kiuj lernis dum UNU jaro kaj KVARONO.

La ekzameno konsistis el traduko el Esperanto AŬ el la franca lingvo de la samaj frazoj en la anglan lingvon. Oni verkis la provfrazojn francalingve kaj tradukis ilin Esperanten. Oni miksis la respondpaperojn. Kontrolis ilin diplomito (kun honoro franc-lingva), kiu ne komprenis Esperanton. Ĉiuj poentoj estis aljuĝitaj laŭ lia propra traduko de la francalingva originalo.

La rezultoj montris, ke ŝajne rilate skriban tradukon en la anglan lingvon, unujara instruo pri Esperanto en la B fluoj almenaŭ egalas trijaran instruon pri la franca lingvo en la A fluoj.

Post unu jaro, oni administris alian provon al la tuta lernantaro. Esperanto jam estis instruata dum preskaŭ du jaroj, sed dum la unua jaro oni malpliigis la nombron da lecionoj de 5 ĝis 3 semajne, dum la franca lingvo ankoraŭ ricevis 5 periodojn.

Ĉi tiun fojon la provo konsistis el 20 simplaj anglaj frazoj, kiuj devis esti tradukataj aŭ en Esperanton, aŭ en la francan. Por simpligi la kontrolon, oni elektis po 20 prov-paperoj el ĉiu lingvo sen rigardo al la klaso aŭ la instrudaŭro. Jen la rezulto laŭ rango en la listoj :—

fino sur paĝo 60

J. Heath :

Internacia festo de kandeloj

DUM la lastaj eĥoj de la fina Kristnaska himno resonis en la salonego de la Ranelagh Lernejo, Ipswich, Anglujo, la 15-an de Decembro 1952, 40 kandeloj brilis sur 2½-metra kristnaskarbo staranta sur la estrado.

La okazo estis la unua Internacia Festo de Kandeloj, aranĝita de S-ro Jack Heath, la lernejestro, kaj S-ino F. E. Shortland. Lernejoj en 17 landoj partoprenis, kaj la alsenditaj kandeloj estis akompanataj de mesaĝoj—multaj el ili bone desegnitaj—per kiuj oni ornamis la murojn de la salonego.

Tuj antaŭ la bruligo de la unua kandelo geinfana ĥoro kantis la konatan Kristnask-himnon “Ho eta urbo Betlehem!”: kaj poste duondeko da geknaboj—inter ili knabino de germanaj gepatroj kaj knabo de polaj gepatroj—bruligis la kandelojn unu post la alia antaŭ kuniĝo de 380 infanoj kaj la stabo, dum S-ro Heath laŭtlegis la mesaĝojn anglalingve. Je la fino, kiam ĉiuj kandeloj jam kune brilis, la ĥoro kantis “Paca nokt’, Sankta nokt’.”

La solena bruligo estis elstaranta ero en speciala Kristnaska Diservo, kiun kondukis Pastro C. H. B. Ridler, la paroĥestro: kaj la ideo kiu inspiris la iniciatadon estis bone esprimita en la mesaĝo, kiu akompanis la kandelon de la Volksschule, Kirchbichl, Tirol, Aŭstrujo: “La unuiĝanta lumo de la kandeloj el multaj landoj estu simbolo de la dezirata unuiĝo de ĉiuj nacioj. Tiam estos nur unu sola homa familio, kaj la sopirata paco.”

La afero bone sukcesis, kaj Pastro Ridler, kiu estas ankaŭ Rotariano,

multe impresiĝis per ĉi tiu uzado de Esperanto.

La venontan posttagmezon oni denove bruligis la kandelojn antaŭ proksimume 200 gepatroj kaj parencoj. Prezentante la bruligon S-ro Heath legis al la ĉeestantaro elĉerpaĵojn el la Unua Kongres-parolado de D-ro Zamenhof: “Tra la aero flugas misteraj fantomoj...”: petante ke ili rigardu la kandelojn kiel la enkorpigon de la bonvol-enhavaj mesaĝoj, kiuj per la bruligo vaporigis kaj miksigis en la aero de la salonego: finante per “Benata estu la tago, kaj grandaj estu ĝiaj sekvoj!”

Post la festo kaj bona raportado en la loka gazetaro multaj gepatroj kaj amikoj parole kaj skribe dankis al S-ro Heath kaj S-ino Shortland, kaj gratulis ilin pro tiel frapanta kaj belaspekta maniero por instigi al la infanoj la ĉiaman Kristnaskan mesaĝon kaj la neceson por homa akordiĝo. Kelkajn kandelojn, kiuj alvenis post Zamenhof-tago, oni bruligis antaŭ la infanaro je la trimestrofinoj; entute 49 kandeloj estis ricevitaj.

La organizintoj deziras esprimi siajn elkorajn dankojn al la multaj geinstruistoj kaj infanoj kiuj partoprenis por sukcesigi ĉi tiun unuan provon. Speciale ili alte taksas la belajn kaj kuraĝigajn leterojn, kiuj akompanis la kandelojn. Tiaj mesaĝoj kiaj: “Dankon pro la iniciatado”—“Kia bela ideo”—“Via ideo estas granda kaj inda je disvastigo”—“Mi estis kortuŝita”—“Via ideo vere estas grandioza”—esprimoj ofte ripetitaj, bone respegulas la sentojn en la koroj de la kunlaborantoj.

Ĉi-jare nur unu arbo—tiu en Ipswich—estis lumigita per 40 kandeloj : sed oni esperas organizi la aferon por ke, la 15-an de Decembro 1953 estu 40 arboj en 40 lernejoj.

Partoprenintaj lernejoj : Sara, Finnlando ; Koskullskule, Svedujo ; Gronau i.W., Germanujo ; Lehçevo, Bulgarujo ; Groen v. Prinsterer, Hilversum, Nederlando ; Whitburn, Anglujo ; Ila Lernejo, Oslo, Norvegujo ; Wilhelmshaven, Germanujo ; St. Joseph U.L.O., Alkmaar, Nederlando ; Volksschule, Kirchbichl, Tirol, Aŭstrujo ; Lehrerseminar, Lebach, Saarlando ; Aalstrup Lernejo, Falling, Danujo ; Isambard Lernejo, Evreux, Francujo ; Scuola tecnica commerciale, Milano, Italujo ; Bismarck-Mittelschule, Frankfurt/Main, Germanujo ; Jan Vermeersch, Delft, Nederlando ; Hafnarfjordur, Islando ; Collège Roumanville, Nyons, Francujo ; Scuola Media Statale "Col di Lana", Roma, Italujo ; Gdansk-Oliwa, Polujo ; Bishop Auckland Gimnazio, Anglujo ; Kajaani, Finnlando ; Mannheim, Germanujo ; Mantova, Italujo ; München, Germanujo ; Orionschool, Amsterdam, Nederlando ; Trebič, Ĉeĥoslovakujo ; Aŭstraliaj geinstruistoj, pere de S-ro Frank Halls ; Vatikan-urbo, pere de F-ino Maria Perugini ; Hungaraj geinstruistoj, pere de S-ro Nicolao Boglasi ; Someron Yhteiskovlo, Somero, Finnlando ; Wrzesnia, Polujo ; Bergen, Norvegujo ; Leeuwarden, Nederlando ; Denton, Anglujo ; Liberec, Ĉeĥoslovakujo ; Bjelovar, Jugoslavujo ; Eyvirat-par-Agonac, Francujo ; Volksschule Springe a. Deister, Germanujo ; Büsum, Germanujo.

Lastatempaj eksperimentoj de paĝo 58.

La plej alta grupo ricevis, franclingve, po 51 poentoj.

La plej alta grupo ricevis, Esperante, po 70 poentoj.

La meza grupo ricevis, franclingve, po 29 poentoj.

La meza grupo ricevis, Esperante, po 46 poentoj.

La plej malalta grupo ricevis, franclingve, po 9 poentoj.


La plej malalta grupo ricevis, Esperante, po 16 poentoj.

Resume, la lernejestro, S-ro Williams, kiu faris la raporton opinias, ke infano povas lerni tiom da Esperanto dum proksimume 6 monatoj, kiom da franca lingvo dum 3-4 jaroj. Li kredas, ke se ĉiuj infanoj lernus Esperanton dum la unuaj 6-12 monatoj el 4-5 jara franclingva kurso, ili multe gajnus kaj nenion perdus.

Komentoj—Estas notinde, ke en ĉi tiu lernejo oni ne faris testojn pri parolkapablo, kaj la inteligentonivelo de la plej bonaj gelernantoj proksimiĝas al tiu de la malpli altaj en la gimnazio, kiuj plej bone sukcesis per Esperanto.

Estus treege interese provi rilate la lernadon de aliaj lingvoj krom la franca, kaj oni devas memori, ke tiuj ĉi gravaj eksperimentoj okazis en nur po unu lernejo, sed laŭ sufiĉe bonaj kondiĉoj.

N.B. La raporto de S-ro Halloran estas havebla (kontraŭ rpk.) angla-lingve, de F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Birmingham 30, Anglujo. Ĝi estas utila NUR por tiuj, kiuj komprenas la testo-teknikon.



38-a Universala Kongreso de Esperanto

25 julion—1 aŭguston, 1953

Poŝtfako 213, Zagreb, Jugoslavujo

N-ro 3

OFICIALA KOMUNIKO

Januaro 1953

Gravega : Pro rearanĝoj en la banko la kontnumero de la kongreso nun estas Narodna banka Zagreb n-ro 402—T 844. Tuj notu en via arkivo.

Perantoj : (nova): Aŭstria Esperanto-Federacio, Fünfhausgasse 16, Wien. (Aldonoj—privatajkaravanoj): S-ro P. Petit, 26 Rue Rochebrune, Rosny-sous-Bois, Seine, Francujo. S-ro H. Bourdelon, 106 Av. Joseph Vidal, Marseille, B. du R., Francujo.

Loĝigado : Interkonsente kun L. K.K. entrepreno "Tunist" transprenis ĉiujn aranĝojn pri loĝigado, komunaj manĝoj kaj ekskursoj. Baldaŭ aperos esperantlingva prospekto kun ĉiuj detaloj. Unu grava rezulto estos ke la hotelaj prezoj *reduktiĝos ĝis triono* ! Unuaranga hotelo ekzemple kostos ne pli ol 400 dinarojn. Pagojn oni faros en sia lando al speciala kontnumero. Ne skribu al L.K.K. pri tio. nur atendu detalojn per bultenoj.

Stratnomado : La magistrato de Zagreb decidis nomi straton "Esperanto". Verŝajne okazos oficiala ceremonio dum la kongreso.

Antaŭkongreso : Okazos antaŭkongreso en Klagenfurt, Aŭstrujo, aranĝota de la Aŭstria Esperanto-Federacio. Detaloj sekvos. Tamen jam nun planu vian vojaĝon por inkludi tiun aranĝon survoje al Zagreb.

Postkongreso : La societo en Ljubljana aranĝos postkongreson tuj

post la 38-a kun ekskursoj al la slovenia montaro kaj groto de Postojna. La postkongresaj ekskursoj finiĝos en Ljubljana, punkto sur la ĉefa fervojlinio al la okcidento. Detaloj sekvos.

Alveno en Zagreb : Trajnoj el la okcidento alvenas en Zagreb ĉ. 23.40. La L.K.K. konsilas al kongresanoj plani sian vojaĝon tiel ke ili alvenos en Zagreb jam vendredon la 24-an de julio por povi partopreni en la Interkona Vespero. Tiuj kiuj tamen alvenos sabaton povos tuj iri al tiu festo en la Hotelo Esplanade (kontraŭ la stacidomo).

Filatelo : Interkonsente kun la L.K.K. la Kroatia Filatela Ligo transprenos aranĝojn por filatelo dum la kongreso. Se montriĝos sufiĉe da intereso, kaj precipe se venos al Zagreb gravaj personoj en la filatela movado la Ligo organizos Internacian Filatelan Ekspozicion kun partopreno de eksterlandanoj. Interesatoj nepre sin anoncu kiel eble plej baldaŭ.

Kotizoj : De nun validas la pli alta tarifo de la dua periodo. Memoru ankaŭ, ke aliĝilojn la L.K.K. *ne akceptos post 30 junio*. Ne risku ĉagrenon sed aliĝu jam nun !

Kongresaj ejoj : La ĉefa kongresa ejo estos en Radnički Dom (Laboristo Domo) ĉe Trg Lenjina (Placo Lenin) ; la festaj aranĝoj (Inaŭguro, Distra, Arta kaj Popoldanca Vesperoj) okazos

fino sur paĝo 77.

Lucija Borčić :

*Perŝipe laŭ la Adriatika marbordo**Oj, maro profunda,
Ĝoj' mia abunda . . .*

KANTAS la junularo, muzikas la marondoj adiaŭante vin en la haveno de Rijeka.

La grize verda akvo de la haveno lude malaperas transkoloriĝante en diversajn nuancojn de la bluo ; kaj dum via rigardo akompanas petolantajn mevojn, la ŝipo jam englitis la montkanalon. Blankaj ŝtonaj dometoj je via maldekstro, pro timo de la nordvento, kiu ne malofte furiozas en tiu ĉi regiono, dense algluiĝis al la rokoj formante malgrandajn urbetojn. Jen : Crikvenica, Selce, Novi, laŭ kies sablaj bordoj svarmas homformikoj ĝuantaj sunon kaj maron. Sub la rokoj, inter la du montoĉenoj Kapela kaj Velebit, la pirata urbo Senj, konata el la romano *Gardu vin de Senja mano*, gardas ankoraŭ hodiaŭ la restaĵojn de la urbaj fortikaĵoj kaj tomboŝtonoj de la "Piratoj". Ĉiam pelate de la "nordvento de Senj" la maro tie ne emas trankvili. Verŝajne pro tio ĝi fuĝis suden kaŝinte sin en la bruston de la montkoloso Velebit kaj fjordo Jablanac.

Je nia dekstro viciĝas insulo post insulo sed ni sekvas velboatojn kondukantajn nin al Rab, la insulo de plezuro, al kiu la historio kaj la naturo ne ŝparis donace. Bosketoj, malgrandaj golfoj estas ĉie dissemitaj kaj dekoj da velboatoj pretas veturigi vin, ĉu al la najbara vilaĝo por satmanĝi omarojn, ĉu al la dekstre situanta ekskursloko Matovica, kie post ebriiga promeno inter la odorantaj mediteraneaj arbustoj oni

servas al vi sekan fumajitan ŝinkon, ruĝan vinon, freŝajn figojn kaj vinberojn. Meze de la maro, tiu eta urbo kun kvar turoj kolektis trezorojn dum jarcentoj kaj gardas ilin nun en proksimume dek kvin preĝejetoj kaj en la proksima monaĥejo.

Denove sub la alta montoĉeno de Velebit. La insulo je nia dekstro nun estas Pag, konata pro produktado de belegaj punktoj. Malgrandaj insuletoj sekvas unuj la aliajn. La



*La kastelo Trakoscan
apud la samnoma lago.*

loĝantoj estas ĉefe malriĉaj fiŝkaptistoj, kiuj por akiri la bezonaĵojn por la vivo eltiras el la marprofundo ĉion kion ĝi prezentas ; de la plej grandaj fiŝoj ĝis spongoj kaj koraloj. Jen estas unu oliv- kaj fig-arbo, kaj jen malfacile akirita peco da tero, nun vitejo. Malriĉaj kaj orfaj kiel iliaj posedantoj, tiuj plantoj elstaras el blankaj rokoj kaj ŝtonamasoj.

Urboj kaj urbetoj viciĝas laŭ la bordo : Zadar, la ortrezorejo ; Beograd, antaŭ mil jaroj kronurbo de kroataj reĝoj ; Ŝibenik, same miljara pure kroata urbo el kies multaj monumentoj precipe elstaras la katedralo de S-ta Jakobo, ĉefverko de la Dalmatia arto el la 15-a jarcento ; Trogir, interesa malnova urbeto plena de antikvaĵoj. Fine sub la monteto Marjan aperas Split, urbo kie interplektiĝas suno kaj maro, ĝojo kaj rido. Ne malproksime de la elfosaĵoj de la malnova romia urbo Salona, ĝi evoluis ĉirkaŭ la iama palaco de la romia imperiestro Diokleto kaj laŭ la marbordo sub Marjan, prezentante interesan interplekton de antikvo kaj moderno. Kiel koro de Dalmatio ĝi allogis al si kaj insulanojn kaj postmontaranojn, kiuj al ĝia jam diversepoka konstruo donas pluan stampon de kolorriĉo. De plej frua mateno ĝis malfrue en la nokto ĝiaj stratetoj sonas je rido, kanto kaj vivoĝojo, pulsanta el la temperamento de belstaturaj sanaj infanoj de tiu urbo, kiun ili adoras kaj pri kiu ili kantas "Mi travojaĝis duonmondon sed ne trovis mian Split".

Ni tamen forlasu ĝin. Suden, en la ombro de la montoĉenoj de Biokovo, preter la sablaj marbordoj de Brela kaj Makarska, preter la alooj kaj palmoj de Hvar kaj Korĉula, ĉirkaŭ la

duoninsulon Pelješac, suden, suden... Al la ĉarmaj ĝardenoj de Lopud kaj Lokrum, al Dubrovnik, la plej ŝatata banurbo de nia marbordo, al kiu la vizitanto ĉiam resopiras ĉar ĝi, malnova, memstara, fiera pro siaj tradicioj, kulturante la arton dum jarcentoj, al ĉiu vizitanto prezentas neelĉerpeblan fonton de ĉiaspeca ĝuo. Dubrovnik—tio signifas : diversajn ekskursojn, palmojn kaj aloojn, cipresojn kaj pinojn, arkitekturon, skulpto- kaj pentro-arton.

Suden, suden . . .

En malgranda golfo maldekstre nestas eta gemo : Cavtat, trankvila, ĉarma ripozejo por naturamantoj.

Iom pli malproksime ni adiaŭas la vaston de la maro kaj eniras la fjordon de Boka Kotorska salutataj de Hercegnovi, flora banurbo inter palmoj kaj oranĝoj.

La rokoj ĉirkaŭ ni nun pli kaj pli altiĝas. La urbetoj Perast, Tivat, Kotor kvazaŭ malaperas en la sinon de la rokoj, kiuj majeste leviĝas supren por kulmini sur la pinto je alteco de 1657 m., kie troviĝas kapeleto kun la tombo de la plej granda Jugoslava poeto Peter II Petrović Njegoš.

Per tiu ĉi mallonga trarigardo la leganto povas ekkoni nur kelkajn partojn de la Adriatika marbordo. La reston, t.e. la Istrian kaj Montenegran marbordojn, kune kun multaj aliaj vidindaĵoj de Jugoslavujo, la kongresanoj ekkonos per la prelegoj dum la 38-a Universala Kongreso en Zagreb, kaj eventuale per la Postkongresaj Ekskursoj.





Mason Stuttard—50-jara

festas sian 30-jaran esperantistiĝon

SIAJN jubileojn la homoj ĝenerale festas hejme, en la rondo de siaj familianoj, malnovaj amikoj kaj konatoj. Sed jen, inter ni troviĝas samideano, anglo, kiu havas malbonŝancon festi du gravajn jubileojn for de sia hejmlando. Li festas ilin malproksime, sed ne en fremda lando inter fremduloj, sed en Esperantujo inter esperantistoj. Ni kiuj jam dum tri monatoj kunlaboras kun li, havis okazon iom pli proksime ekkoni nian K.K.S-n, samideanon Mason Stuttard, kaj ni sentas ke estas nia devo konigi ankaŭ al la cetera mondo Esperantista kelkajn detalojn pri li.

Li naskiĝis en la nordangla industria urbo Burnley, la 30-an de januaro 1903, kaj 20 jarojn poste li esperantiĝis. Kiel juna knabo li interesiĝis pri sociaj problemoj; li kandidatis dufoje por la komunumaj elektoj kaj dum la milito organizis en Blackpool la sindikaton de la fajrbrigadanoj fariĝante sinsekve: loka, distrikta kaj regiona sekretario. Ne estas, do, mirinde, ke la junan idealiston allogis ankaŭ alia grava socia faktoro en la formo de la Internacia Lingvo. Li sukcese redaktis la bultenon de la Federacio de Lancashire kaj Cheshire, dum 11 jaroj, la lastajn 3 jarojn estante sekretario de la Federacio kun Prof. Collinson kiel prezidanto.

La literaturan karieron de S-ano Stuttard instigis literatura konkurso

en la nomita federacio, kie, per du originalaj noveloj li gajnis la unuan kaj la duan premiojn. Dum la milito S-ro Stuttard kunlaboris kun S-ro E. J. Lock je kompilo de "Nelson's Esperanto Course", eldonita en 1946. Samjare aperis la kolekto de rakontoj sub la titolo de la unua rakonto "La virineto en bluo". Je ĝia apero la konata beletristo Georges Avril komentis en la recenzo, ke tiu verko stampas la aŭtoron unu el niaj plej bonaj stilistoj.

Post la militservo en 1946 li iris en la Centran Oficejon en Heronsgate. Dum tiu tempo kaj ĝis la kunfandiĝo de I.E.L. kaj U.E.A. li redaktis *Esperanto Internacia*, restante ankaŭ post la kunfandiĝo helpa redaktoro de la revuo "Esperanto".

En 1948 li gajnis la Esperantan premion en la universitato de Liverpool per eseo pri literaturo inter la du mondmilitoj kaj traduko el Charles Dickens. Post tio aperis *Morto de trajno*, aldona stampo al la originale fluanta stilo de la tradukinto.

Junion 1951 S-ano Stuttard iris al Munkeno por transpreni la laboron pri la 36-a U.K. Munkenon sekvis Oslo. Ne necesas vicigi liajn meritojn en la sukceso pri tiu manifestacio. La prikongresa numero de la *Norvega Esperantisto* svarmas je laŭdoj al tiu viro, pri kiu la frontartikolo diras: "Feliĉe ekzistas geniulo kun la nomo

fino sur paĝo 68



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de UEA.*

Lernolibro de Esperanta Stenografio, laŭ la alfaro de P. Flageul. 27 × 21 cm., 16 paĝoj. Havebla ĉe A. C. Provost, 15 Rue Lesage, Paris XX, Francujo. Prezo 75 fr.fr. aŭ 3 rpk.

Stenografistoj esperantistaj memoras la nomon de samideano Flageul, kiu dum jardekoj klopodis konatigi Esperanton inter la stenografistoj francaj kaj la sistemon de Duployé inter Esperantistoj. La adapto de tiu ĉi sistemo, tre disvastigita en Francujo, al Esperanto estas lia verko kaj multaj estas la laboroj plenumitaj pri tio de li. Estas gratulinda, ke junaj fortoj reprenis tiun ĉi aferon kaj reeldonis lernolibron.

Aperis dume "Stenografiaj gamoj", tri kajeroj tipografia, metagrafia kaj stenografia (prezo kune 420 fr.fr.)

H.J.

***Karta Enciklopedio**, eldonita de G. Marin, La Bosketo, Whiteway, Stroud, Glos., Anglujo. 16 kartoĵoj 2 ŝil.

La eldoninto efektivigis taŭgan ideon, nome starigi enciklopedion daŭre kompletigeblan per kartoĵoj. Ni havas sub mano kvar novajn temojn: Magdalenia arto, Menhiro, Subakviga punseĝo, kaj Bilda jarlisto, ĉiu kun ilustraĵo. La formato estas tiu de kutima poŝtkarto, 15 × 11.5 cm. Ni revenos en detala artikolo pri tiu ĉi metodo redakti, presigi kaj disvastigi enciklopedian kartaron.

H.J.

Natura Klasifiko de la Elementoj, de A. F. Cabral. Esp. Societo de Porto Alegre, Caixa Postal 1415, Porto Alegre, R.G. do Sul, Brazilo. 4 paĝoj kaj kolora diagramo. Prezo ne montrita.

Multaj formoj de la perioda klasifiko de la elementoj aperis. Unu el la plej bonaj estas tiu de D-ro Cabral, sed, pro tio ke ĝi estis eldonita en la portugala lingvo (de la brazila "Instituto Agrônômico do Sul" en 1946), ĝi ankoraŭ ne ricevis la atenton, kiun ĝi meritas. Por pli diskonigi ĝin, oni nun eldonis ĝin kun klariga teksto en Esperanto. La klarigo estas lerte farita en modela lingvaĵo. La diagramo de Cabral estas modifo de la spirala formo de la perioda tabelo de la elementoj, en kiu, per taŭga poziciado de la elementoj kaj per koloraj kunligaj linioj, oni montras ne nur la interrilatojn kutime montratajn en tia tabelo, sed ankaŭ la detalan elektronan strukturon de la atomo de ĉiu elemento.

D. R. Duncan.

Raporto pri Internacia Konferenco de Esperantistaj Studentoj kaj Altlerneĵanoj. Eld. I.F.E.S.A., Laksegade 35, København K., Danlando. 30 × 20 cm., 20 paĝoj, multobligita, prez. 5 rpk.

Instiga verketo, pro konciza klara raporto pri laboro farita, kiu anoncas la fondon de Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Alt-

lernejanoj. Unu el la gravaj bezonoj de la movado estas junaj sciencistoj pretaj enkonduki Esperanton en la sciencon medion. Nun la studentoj alprenis la laboron mem. Ili organizis konferencon kaj analizis multajn problemojn de la studenta vivo. Ili diskutis metodojn pli vaste utiligi la lingvon inter studentoj kaj ellaboris simplan statuton por la federacio. Ĉiu serioza samideano aplaŭdos ĉi tiun agadon kaj multaj deziros legi gravan historian dokumenton.

N. R. Smith.

Nia Lingvo Esperanto : Karl Vanselow. Elektita poezio por deklamo kaj por kanto. Kajero 1, Serio 1, Pretigu vin. 14 × 10 cm., 32 paĝoj. Berliner Esperanto-Verlag. Ĉe la aŭtoro, Winterfeldtstr. 27, Berlin W. 35, Amerika sektoro. Prezo : 0.50 Gmk. aŭ 2 rpk.

Karl Vanselow, la maljuna poeto kun juneca koro, ĝojigas kantemulojn per la eldono de tiu ĉi libreto, kies plej granda parto estas tradukaĵoj de konataj kantoj. Elasta kaj agrabla transdono de nacia lingvo en internacian, jen nia konstato. Ni citu nur eron el la *Arbar-feino* de Lehár (Gaja vidvino) :

*Vilja, ho Vilja, fabela fein',
Estu la mia, feliĉigu min.
Aŭdu la voĉon de mia ador',
Ne plu de mi iru for.*

Ĉarma ideo de la verkinto estis enmeti poemon *Dediĉa diro* al Universala Esperanto-Asocio, kion ni represas en *Esperanto*. Ni deziras al tiu ĉi eldonaĵo grandan sukceson.

H.J.

Das Esperanto-examen. Kompilita de Hans Koch, München. Eldonis Verlag Esperanto-Kurier, Offenbach

am Main, Germanujo. 15.5 × 11 cm., 16 paĝoj. Prezo 0.45 Gmk. aŭ 2 rpk.

Koncize kaj precize la verkinto, gvidanto de la direktorio de la Germana Esperanto-Instituto, informas pri la maniero kaj kondiĉoj de ekzamenoj diversgradaj pri Esperanto. La nova Esperanto-Instituto Germana reprenas la tradicion de la estinta GEI en Leipzig, fondita de du eminentaj samideanoj D-ro A. Steche kaj Profesoro Dietterle. La nuna libreto pruvas unu plian fojon kiom serioze niaj germanaj samideanoj laboras kaj klopodas regajni la grandan perdon okazintan post 1933 ĝis 1945.

H.J.

La Communauté Européenne de défense et la question des langues : Léon Agourtine, capitaine-interprète de réserve. Préface du Général G. Malraison, introduction du Lt.-Colonel R. Leger. 12 paĝoj, 31 × 21 cm., ciklostile presita.

Antaŭ kelkaj monatoj ni sublevis tie ĉi la ekzistantan problemon de la peradlingvo inter la anoj de la eŭropa defendo. La supre indikita tezo (La Eŭropa Komuneco Defenda kaj la lingva demando) prezentas la aspekton de la problemo kaj ĝia solvo pere de Esperanto. Per trafaj argumentoj kaj faktoj la verkinto montras la utilecon de nia lingvo kaj la rolon kiun ĝi povas ludi okaze de kunlaboro inter la okcidentaj landoj. Utila dokumento kiu meritas esti presota. La antaŭparolo de Generalo Malraison montras unu fojon plian, kiom da homoj kontaktiĝis kun Esperanto, lernis ĝin kaj . . . flankenlasis; ilustraĵo de la Zamenhofa vorto : "Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, ni semas kaj semas konstante."

H.J.

Mason Stuttard :

En lastatempa numero de landa organo aperis artikoleto sub la rubriko “Kio estas disciplino?”. Ŝajnas al mi ke starigante la demandon la verkinto nur iomete ĝin respondis. Tial opiniante la demandon sufiĉe interesa en la pli vasta kadro de internacia organo mi donas mian respondon al la demando.

Kio estas disciplino ?

ESTAS konata fenomeno ke kiam oni legas ion pri la faktoroj kontribuantaj al la homa psiko kaj precipe kiam temas pri mankoj en la konsisto de la homa karaktero, homoj ordinare tuj pensas pri konatoj siaj en kiuj troviĝas—laŭ ili—ĝuste tiuj nedezirindaj ecoj prezentataj. Tial estas konsilinde ke je tralego de la jenaj observoj oni apliku la analizon al si mem, ĉar la kruda fakto restas ke al ni ĉiuj mankas disciplino en unu aŭ alia rilato.

Disciplino estas la rekono de tio ke ĉia socia (kaj societa) vivo estas “dudirekta strato”. Partoprenante en socia vivo kaj ĝuante la privilegiojn de tiu partoprenado la disciplinita homo agnoskas siajn devojn al la socio kaj ne domaĝas ilin plenumi. Tio gravas. Homoj tiel ofte pretas proklami kio kaj kiaj estas la devoj de aliaj homoj ; sed disciplino estas esence afero privata. Temas do pri propraj devoj.

Disciplino krome estas agnosko de homaj valoroj. Disciplinita homo rekonas la meritojn de homo kiu tamen pensas kaj agas laŭ maniero kiu ne akordas kun lia propra pensmaniero. Li ne sentas ofendon kontraŭ homo kiu esprimas opiniojn kiuj konfliktas kun liaj propraj opinioj. Disciplino tamen diktas rekonon ankaŭ de la propraj valoroj kondiĉe ke tiu rekono estu honesta, justa kaj objektiva ĉar ĉiam devas esti ia antaŭjuĝo je konsidero de la propraj meritoj. Disciplino ĵaluze gardas la personan honoron, ne por

gajni ian efemeran estimon aŭ respekton de la ekstera mondo sed por krei en si la konscion pri honesto kaj veremo en ĉiuj rilatoj. Oni povas konstati, ke en ĉiuj cirkonstancoj tiu konscio estas neŝanceblebla roko nevenkebla de ia ajn atenco de envio, moko aŭ kolero. Mensogo, malvero kaj malhonesto povas akiri por demagogo kelktempan renomon sed ĉiam okazas ke pli aŭ malpli frue, en nesingarda momento, la vualo leviĝas. De tiam lian memestimon korodas la scio ne nur ke li konas sin malsincera kaj nefidinda sed ankaŭ ke aliaj homoj tion scias.

Disciplino antaŭ ĉio signifas objektivan pensmanieron. Ĉe homo disciplinita la emocioj—tiu plej malstabila kaj malplej fidinda parto de la homa psiko—ne influas la decidojn kaj prijuĝojn. Privataj opinioj, personaj inklinoj, eĉ propra materiala avantaĝo devas cedi antaŭ la pezo de faktoj kaj la vero. En vere demokrata organizaĵo disciplino diktas akcepton de verdikto kiu eventuale kontraŭas tiujn personajn apartaĵojn. La principo “se vi ne ludas laŭ mia maniero mi tute ne kunludas” apartenas al la infanejo sed ne al la medio de spirite maturaj homoj.

Disciplino, mallonge, kernigas la universalan etikon : ke ĉiu homo ĝuas rajtojn kiujn li praktiku kondiĉe nur ke tiu praktikado ne perfortu la rajtojn de aliaj homoj. En tio ni vidas la paradokson de la disciplino—speco de sinbrido—kiu estas efektive

esprimo de *vera* libereco.

Plenumo de promeso, ĝentileco, honesta traktado, toleremo, veremo, lojaleco, jen kelkaj el la eksteraj signoj de disciplino. Tiuj virtoj estas tiom necesaj en la organizado de nia Esperanta movado, kiom en la pli vasta sfero de la homa socio kaj ĝuste la manko de tiuj eroj de disciplino estas unu faktoro kiu kontribuas al nesukceso de ambaŭ sferoj.

Studu la historion de la Esperanta movado kaj konstatu kiom ofte la fluon de okazaĵoj direktis personaj konfliktoj, individuaj malsimpatioj kaj regemo. Simile kiel en ĉiuj movadoj, ankaŭ en la Esperanta, nestis la malgrandaj kokoj volantaj kikeriki sur propra sterkejo. Eĉ nuntempe videblas konflikto de individuaj volo, kaj tio pensigas, kiom ankoraŭ da etaj ĵaluzoj, imagataj ofendoj, envio kaj ambicioj ĝermas en sekretaj lokoj eventuale por la kontentigo de persona egoismo, sed por la malprospereco de nia movado? Ĉu ni ne ĉiuj konas la fenomenon en preskaŭ ĉiuj niaj kluboj kaj societoj?

Manko de disciplino montriĝas en diversaj aliaj manieroj. La homo kiu promesas fari komision sed ne faras; la homo kiu daŭre partoprenas en la klubo vivo ĉion ĝuante sed nenion donante, eĉ ne kotizon; la homo kiu en klubaj kunvenoj ĉiam direktas kritikon kaj mallaŭdon pri la gvidado de la aferoj sed mem rifuzas akcepti ian ajn oficon; la homo kiu pruntadas librojn kaj gazetojn de samideano sed mem eĉ ne unu libron aĉetas aŭ gazeton abonas; la oficisto de klubo kiu ĉion prokrastas tiel ke la laboroj de kolegoj estas fuŝataj aŭ vanigitaj; la samideano — de kiu dio nin gardu! — kiu ĉiam kaj ĉie propagandas

Esperanton sed mem ne ellernas ĝin kaj ĝin fuŝuzas; la homo kiu ofendiĝas ĉar la klubo aŭ la aliaj komitatanoj voĉdonis kontraŭ lia propono Ili nombro estas netaksebla. Ilin ĉiujn tamen karakterizas la sama eco: manko de disciplino.

La klubo kaj societa vivo estas la bazo de nia tuta movado. Laŭ la kvalito de la klubo, tia la kvalito de la pli grandaj organizaĵoj. La klubo estas la vartejo de nia afero. Ĝuste tie devas komenciĝi la edukado de niaj adeptoj, ĉar nur kun sanaj kaj bone disciplinitaj kluboj ni povas esperi pri sanaj kaj disciplinitaj organizaĵoj en pli granda formo. Nur tiel fakte povas prosperi nia afero entute.

de paĝo 64

Mason Stuttard, sen kies laborego nia revo povis neniel realiĝi, eĉ se ni ĉiuj klopodus ”

Li venis kiel anglo al tute nekonata lando, al la lando pri kiu li aŭdis plej diversajn opiniojn. Tri monatojn li troviĝas en nia urbo sentante sin hejme inter esperantistoj.

Ĉiam bonhumora, laborpreta, helpema, ĉiam trovanta la ĝustan eliron el la problemoj, nia ŝatata K.K.S. ne prezentas al la Jugoslavaj esperantistoj nuran kongresan sekretarion, sed multflankan kunlaboranton. Lia restado inter la Zagrebaj esperantistoj alportis novan freŝon, instigon kiu daŭre impulsos niajn anojn, pro kio, ankaŭ ĉi loke ni dankas al S-ro Stuttard kaj al lia afabla edzino.

Al nia duobla jubileanto ni gratulas, ne nur en la nomo de la Jugoslavaj, speciale Zagrebaj esperantistoj, sed ankaŭ en la nomo de la tutmonda esperantistaro, dezirante al li multajn jubileojn en la rondo Esperantista.

Bo-Bo, Zagreb.

Canberra

En la numero de *Esperanto* de la 20-a de Julio 1911 aperis artikolo de S-ro G. Whiteford titolita "La Aŭstralianoj konstruas Ĉefurbon". Ĝi priskribis internacian konkurson organizata de la registaro de Aŭstralio por havigi planon por nova nacia ĉefurbo, kaj petis al la Delegitoj de U.E.A. konigi la aferon al intereseblaj personoj. Legis la artikolon juna franca arkitekto Alfred Agache, kiu ensendis planon kaj gajnis la trian premion. Nun la urbo estas konstruita kaj enhavas viglan grupon de samideanoj, inter kiuj S-ro Whiteford. La suba artikolo rakontas pri la evoluo de Canberra dum la lastaj 40 jaroj. Ĝi estis verkita por la *Continental Daily Mail* de S-ro W. S. Kent Hughes, Ministro de Internaciaj Aferoj en Aŭstralio kaj reviziita kaj tradukita, kun la permeso de la aŭtoro kaj de la nomita ĵurnalo, de S-ro R. L. Harry, Konsilanto en Aŭstralio Departemento de Eksterlandaj Aferoj kaj prezidanto de la Esperanto-Klubo de Canberra.

Historio

POST kiam la Federacio de Aŭstralio estis proklamata, la 1-an de Januaro, 1901, la projekto de nacia ĉefurbo alterne antaŭeniris forte aŭ velkis kiam la nacio trapasis periodojn de prospero, la krizojn de du mond-militoj, kaj la tutmonda ekonomia depremiĝo.

Nuntempe, kvankam estas ankoraŭ multe farota antaŭ ol la plano de la urbo estos plenumita, Canberra estiĝis unu el la plej gravaj allogaĵoj de la nacio. Ĝi estas la politika kaj diplomata koro de la lando, la fonto de leĝoj formulitaj de la Federacia Parlamento, la scenejo de delikataj nacia kaj internacia traktado, kaj dum ĉiuj sezonoj de la jaro loko de granda natura kaj planita beleco.

Oni komencis serĉi lokon por la nacia ĉefurbo nelonge post la fondo de la Federacio de Aŭstralio. Argumentoj furiozis multajn jarojn en la Federacia Parlamento dum pretendoj nun pro unu distrikto nun pro alia alportiĝis. En la jaro 1907, tamen, grupo de federaciaj deputitoj kiuj hazarde vizitis la distrikton de Canberra-Yass por fiŝĉasa ekspedicio estis tiel mirigitaj de la natura beleco de la pejzaĝo kaj la sufiĉaj provizoj de akvo ke ili alportis la pretendojn de la distrikto kiel sidloko por la nacia ĉefurbo.

La intertraktado pri la repreno de 940 kvadrataj anglaj mejloj (1920 kv. kilometroj) da tero kaj la akceptigo de la necesaj leĝoj okupis iom da tempo, sed la 1-an de Januaro 1910, naŭ jarojn post la inaŭguro de la Federacio, la Aŭstralia Ĉefurba Teritorio estiĝis.

La sekvanta problemo estis la elekto de loko por la ĉefurbo mem.

Oni komencis termezuron de la teritorio, konforma areo iomete enloĝata, plejparte pli alta ol 2,000 futoj (600 metroj) super la marnivelo, en la altebenaĵo Monaro. Ĉi-tie estas la tuta suna ĉarmo, tipa de la altaj lokoj en Aŭstralio. En ĉiu parto de la areo rivervaloj kaj herbaj altejoj montas al ondetaj submontoj kovritaj de eŭkaliptarboj, kiuj grade leviĝas en la ŝiritajn bluajn mont-pintojn de la Aŭstraliaj Alpoj. Vintre ĉi tiuj montoj provizas bonajn neĝkampojn por la ski-entuziasmoj. Somere rapidfluantaj riveretoj, je la piedo de krutaj valetoj kiuj dividas la pintojn, allogas centojn da fiŝĉasantoj, kaj dum la tuta jaro la kamparo oferas bonegajn okazojn por enarbara promenado, piknikado, surĉevalrajdado, kaj pafĉasado.

La sidloko elektita de la land-mezuristoj, la valo de la rivero Molonglo, liveras okazojn por efika urbplanado.

La Plano

Post kiam la urbloko estis elektita la Federacia Registaro organizis internacian konkurson por plano de la nova nacia ĉefurbo.

La konkurso allogis 137 partoprenantojn. La unua premio estis aljuĝata al Walter Burley Griffin, pejzaĝa arkitekto de Chicago en Usono. La duan premion gajnis Eliel Saarinen en Helsinko, kiu havigis eŭropan renomon per sia Finlanda Konstruaĵo je la Pariza Foiro de 1900. La tria premio estis donita al Franca arkitekto, D. A. Agache en Parizo.

Fine trajtoj el kelkaj konkursaj projektoj estis elektitaj en la planojn por la urbo Canberra sed la estraro planon superregis la koncepto de Walter Burley Griffin, kiu pasis iom da tempo en Aŭstralio dum la fruaj tagoj de planado kaj konstruado.

Estis multe da diskutado pri la origino de la nomo "Canberra" sed nun estas ĝenerale konsentite ke la nomo estas de indiĝena origino kaj signifas "la kunvenejo". Ĉi-tiu estas plej taŭga, ĉar Canberra nun estas ne nur la kunvenejo por membroj de la Ĉambro de Reprezentantoj kaj de la

Senato sed kunvenejo kie internaciaj aferoj estas diskutataj kaj solvataj, kaj ankaŭ ŝatata loko por kongresoj. La populara aŭstralia metodo prononci la nomon estas "Kanbra", kun la akcento sur la unua silabo. La nomo estis oficiale donita al la nova urbo la 12-an de Marto, 1913, de Lady Denman, edzino de la tiama Ĝenerala Gubernatoro de Aŭstralio.

Nuntempa Urbo

La urbo, kiu nun havas enloĝantaron de preskaŭ 30,000 entenas kelkajn belajn konstruaĵojn. La plej grava nacie, kvankam eble ne arkitekture, estas la Parlamentejo, kiun oni priskribas kiel provizora konstruaĵo, sed kiu en ĉi tiuj tagoj kiam konstruado estas tiel malfacila, verŝajne estos la hejmo de la Federacia Parlamento dum longa tempo. La kutimo dissendi, per la naciaj retoj de radiostacioj, la debatojn de ambaŭ ĉambroj de la Parlamento pliigis la intereson de homoj ĉie en Aŭstralio kaj pri politikaj aferoj kaj pri Canberra, kaj estas konstanta fluo de vizitantoj kiuj deziras rigardi la Parlamenton laborantan.



Canberra 1911—laŭ pentraĵo de T. Penleigh Boyd.

Unu el la plej impresaj konstruaĵoj en Canberra estas la Aŭstralia Milita Monumento, digna sanktejo lokita en parko de 35 akreoj (14 hektaroj) je la piedo de la Monto Ainslie (pron. Enzli) rekte kontraŭ la Parlamentejo trans la rivervalo.


La plimulto de la domoj en Canberra apartenas al la registaro. La meza loĝspaco por ĉiu homo estas ĉirkaŭ 1.35 akreoj (0.64 hektaroj) kiu estas multe pli granda ol la loĝspaco en la plimulto de urbegoj kaj grandaj urboj. Ĉi tiu grandspaceco estas unu el la kaŭzoj, kial Canberra estas iĝinta ĝardenurbo kaj multaj el la enloĝantoj entuziasmaj ĝardenkulturantoj. Miliono kaj duono da arboj estas plantitaj de la Departemento por Internaj Aferoj en la urba areo, kiu entenas 2,500 akreojn (1,000 hektarojn) da parkoj kulturitaj. Por stimuli

privatan ĝardenkulturadon, la Departemento donacas arbojn kaj arbustojn senpage al dommastroj. Tial ne estas surprize ke la pejzaĝo estas kolorplena dum la tuta jaro de la frua printempo kiam orkoloraj akacioj kaj florantaj fruktarboj floras. Ĝis vintraj beroj vidiĝas ĉie sur heĝoj kaj arboj. Canberra estas neordinare sunhava kun hela atmosfero kaj brilaj sunsubiroj.

Vivo en Canberra

Senpaga klerigado estas provizata per la publiklerneja sistemo. Antaŭlernejaj centrejoj, infanejoj, komencaj lernejoj, gimnazioj, enhavante ekleziajn lernejojn, kaj la universitata kolegio, oferas altajn nivelojn kaj bonajn agrablaĵojn.

Sporteblecoj estas nemultekostaj kaj facile atingeblaj. En la urbo mem



Parto de Canberra nuna vidata de la aero.

oni povas ludi tenison, golfon, futbalon, kroketon, hokeon, aŭ bulojn, surĉevalrajdi, naĝi aŭ promeni. Per mallonga vojaĝo oni povas fiŝĉasi en la tumultaj montaj riveretoj aŭ en la rivero Murrumbidgee (pron. Murumbiĝi) kaj dum vintro estas bona skiado sur la neĝaj deklivoj de montoj distance nur 40 mejlojn.

La Evoluo de Canberra

Canberra kreskos laŭ grandeco kaj graveco. La Centraj Sekretariaj roj de la plimulto de la departementoj de la aŭstralia federacia registaro estas jam establita en la urbo kaj la intenco estas ke la ceteraj estu tien transigitaj kiel eble plej baldaŭ.

Ĉiun jaron pli da diplomataj postenoj estas malfermitaj en Canberra per la Registaroj de aliaj regnoj, kaj la urbo rapide alprenas la gravecon de internacia centrejo en la sudpacifika regiono por komercaj kaj politikaj diskutoj.

Eble la plej grava lastatempa okazaĵo estis la fondo de la Aŭstralia Nacia Universitato, kiu starigas en Canberra esplorajn lernejojn rilate al la medicino, la fizikaj sciencoj, la sociaj sciencoj, kaj al studoj pri la pacifika regiono. Ĉi tiu universitato havas en sia instruistaro tiajn mondkonatojn kiajn Sir Howard Florey (patologio) Profesoro Raymond Firth (antropologio) kaj Profesoro Marcus Oliphant (fiziko).

Fotoj afable disponigitaj de la Aŭstralia registaro.

**Varbu viajn amikojn por U.E.A.
Tio helpas al ĝi plibonigi la
revuon !**

Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Rossetti. Al Karola kaj Reto Rossetti (39 Willows Crescent, Birmingham 12, Anglujo) naskiĝis filo, John Bernard Orsino, la 8-an de decembro 1952.

Geedziĝo

Nielsen-Christensen. Benny Nielsen kun F-ino Maria Christensen (Vejlevej 47, Kolding, Danlando), ambaŭ tre agemaj Esperantistoj en la Dana movado.

Ĵubileo

Rektoro Karl Söderberg, FD en Upsala, Svedujo, fariĝis 50-jara la 6-an de Januaro.

Hugo Steiner, fondinto kaj direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, fariĝos 75-jara je la 26a de Februaro, 1953.

Al ĉiuj ni esprimas nian sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Avril, S-ro Georges, en Nice, Francujo, la 23-an de decembro 1952, 78-jara. Li estis Akademiano kaj inter la plej viglaj kaj plej bone konataj Esperantistoj en Francujo. Li estis ĉefredaktoro de la franca gazeto *L'Eclaireur de Nice*. De 1934 ĝis 1938 li eldonis kaj redaktis la Esp. revuon *Nia Gazeto*. Lia forpaso estas grava perdo por la movado nacia kaj internacia.

Ferree, D-ro George P., Mill Hill, Pa., Usono mortis en la aŭtuno 1952. Dum multaj jaroj bona subtenanto.

Hattersley, S-ro Charles Marshall, el Mexborough, Anglujo, mortis en Kanado dum vizito je 26 decembro 1952, 56-jara. Antaŭe FD de UEA en Mexborough.

Noeske, S-ro Conrad, Berlin, Germanujo, mortis la 13-an de januaro, 57-jara. Esperantisto de 1913, estro de la Berliner Esperanto-Verlag.

Ralph A. Lewin :

Konduto de seksĉeloj de *Chlamydomonas*


POR progresigi nian komprenon de la maniero per kiu la verdaj plantoj fiksas dioksidon de karbono el la aero, taŭgas studi malgrandajn vivaĵojn, kiuj rapide sin reproduktas kaj kiuj estas facile teneblaj en provtuboj. Oni povas produkti mutaciojn per ultraviola radiado, kompari la novajn kun la naturaj tipoj, kaj el iliaj diferencoj lerni multon pri la procedo de fotosintezo. Por tiaj esploroj *Chlorella* estas multe uzata sed bedaŭrinde al tiu algo mankas sekseco; tial oni neniel povas rekombini la novajn karakterizojn en unikan ĉelon por studi kiel ili kune funkcias.

Chlamydomonas Moewusii estas unuĉela algospeco de grundaj akvoj, libernaĝanta per du vipformaj naĝiloj. Ĝi reproduktiĝas sekse kaj tial verŝajne fariĝos *probesto* tiel utila kiel la fungo *Neurospora* (ne verda kaj pro tio ne kapablas je fotosintezo). La ĉeloj de la du seksoj (indikitaj per + kaj —) estas tute ne distingeblaj, krom per sia sekskonduto. Tial oni povas diri, ke la diferencoj estas sole psikologiaj.

Kiam en akvo oni kunmiksas seksĉelojn de ambaŭ tipoj ili kuniĝas en amasojn el du-tri ĝis pli ol kvindek individuoj. Post kelkaj minutoj disiras de la grupoj ĉelparoj duope kunligitaj komence per la naĝiloj kaj poste per la antaŭaj ekstremoj de la ĉeloj. Tiuj paroj agas kvazaŭ unuopaj individuoj, moviĝante ĉiam laŭ la sama direkto. Evidente unu el la paro daŭrigas la naĝadon dum la alia pasive trenas la naĝilojn posten tra la akvo (bela ekzemplo de natura

efikeco; ili iras kune anstataŭ kontraŭnaĝi kaj tiel ŝparas energion). Ekzistas do diferenco inter la samaspektaj kuniĝantoj, sed kiel ekkoni unu de la alia?

Nu oni povas meti diversajn distingilojn en la ĉelojn por posta rekono de + kaj — individuoj. Plej simple estas malnutri la ĉelojn de unu sekstipo per mallumado dum kelkaj tagoj. Rezulto estas malpli granda de la protoplasmo kaj la apero de malplena spaco en la ĉelŝelo. Se oni nun intermiksas malnutritajn + ĉelojn kun turgaj* ĉeloj oni facile konstatas, ke en ĉiu paro da ĉeloj, unu, malnutrita kaj tial + puŝas turgan, nenaĝantan —. Reciproke, se oni metas en mallumon la — ĉelojn antaŭ ol kunmiksi la sekstipojn, oni ankoraŭ konstatas, ke la + puŝas la —, kaj tial certigas, ke la kondiĉo de la nutraĵo ne influas la kutiman agon.



Du kunfandiĝantaj ĉeloj de *Chlamydomonas*.

(Unu el la kvar naĝiloj estas nur parte videbla sur la foto.)

Elektronmikrografo : pligrandigo $\times 2000$.

Cetere oni povas uzi genetajn distingilojn. Ekzemple unu mutaciita (ŝanĝita) geno (nedividebla mendela eco de heredo) kontrolas la sekrecion de volutino† en la ĉeloj, kiujn oni rekonas per refraktaj sferoj. Per krucigoj oni povis transmeti tiun karakteron de unu sekstipo al alia kaj, kiel ajn oni faras la eksperimenton, vidiĝas ke la + estas la puŝanta parero (ĉu ĝi tamen estas virseksa aŭ virinseksa, tion oni ne scias). Interese estas, ke ekzistas iuj + ĉeloj kiuj pro aliaj mutacioj estas paralizitaj kaj tute ne povas naĝi; sed kiel seksĉeloj ili kapablas kuniĝi kun — ĉeloj. Kvankam tiuj lastaj povas bone naĝi, ili tute ĉesas post la kuniĝo kaj pro tio la paro restas senmova. Ŝajnas ke la — ĉelo pro kutimo ne plu naĝas, kaj la + ĉelo, pro paralizo ne povas ! █

Post dek kvar horoj (sed ne malpli) da daŭra lumo la kuniĝo de la seksĉeloj kompletigās formante zigoton‡. Post pli ol tridek horoj da lumo, la zigoto eniras dorman staton kaj estas malfacile ĝermigebla. Inter tiuj limoj, t.e. per 14-30 horoj da lumado, oni povas kaŭzi regulan ĝermiĝon post naŭ tagoj, kiam denove + kaj — ĉeloj elvenas el ĝi. La vivciklo do estas sufiĉe mallonga por ebligi al la sciencisto ekspluati la ĉelojn por la studo pri la planta fiziologio.

(*Ralph A. Lewin, filo de pioniro Esperantista M. Lewin, D. de U.E.A. en Dunstable, Anglujo, estis profesoro en Universitato Yale en Usono.—Red.*)

* turga : stato je kiu la ĉelo pleniĝas de salo, kio rigidigas ĝin.

† volutino : materialo de iuj ĉeloj.

‡ zigoto : internacia vorto ; nomo de la ĉelo, kiu formiĝas kiam du gametoj (t.e. seksĉeloj) kunfandiĝas. Ĝi tial enhavas duoblan nombron da kromosomoj.

Tutmonda ekspozicio de infandeseĝnaĵoj

Dum la aŭtuno 1953 okazos en Stockholm tutmonda ekspozicio de infandeseĝnaĵoj, aranĝota de Sveda Laborista Esperanto-Asocio kunlabore kun granda, ĉiutaga gazeto *Aftontidningen*.

La deseĝnaĵoj povas esti koloraj aŭ blank-nigraj, kaj la temo estos "Laboro kaj festo en nia hejmlandregiono." Sur ĉiu deseĝnaĵo devas esti notita en nacia lingvo kaj en Esperanto la nomo de la lando kaj la titolo de la deseĝnaĵo. Krome, la nomo kaj la aĝo de la deseĝninto. Rajtas partopreni infanoj en aĝo ĝis 15 jaroj; ĉiu partoprenanto ricevos rekompencan.

Ni petas helpon de esperantistoj en la tuta mondo. Precipe ni turnas nin al la ĝeinstruistoj, kun peto pri alsendo de deseĝnaĵoj, kiuj konformiĝu al la supra temo. Helpu nin montri al la redakcio de la kunlaboranta gazeto kaj al la vizitantoj, ke esperantistoj vere kapablas fari praktikan laboron.

*Sveda Laborista Esperanto-Asocio,
Barnhusgatan 8, Stockholm, Svedujo*

HELSINGÖR

Internaciaj FERIAJ E-kursoj
18-25 de julio

Konversacia kurso, prepara kurso por Cseh-metodaj ĝeinstruantoj. Daŭriga kurso, k.t.p.

Unu semajno inter centoj da ĝesamideanoj el 10-15 diversaj landoj. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,

Ingemannsvej 9,

Aabyhøj, Danlando.

Maurice Lewin :

Moderna fabelo

IAM antaŭ longa tempo la registaroj de la mondo kunvokis konferencon por eltrovi kaj pridiskuti rimedojn per kiuj eviti la elspezojn kaj klopodojn rezultantajn el la transportado de oro de unuj landoj al aliaj. Tiu transportado estis necesa de tempo al tempo en la tiama financa sistemo por ĝustigi la variojn de la landaj orvalutoj.

Oni interkonsentis, ke la transportado kaŭzas malŝparon de energio, kaj iu delegito proponis, ke oni konservu la tutan oron de la mondo en unusola loko kaj poste registru ĉiun ŝanĝon kiu okazas per simpla enskribo en kontlibrojn.

Tiun proponon la kunveno entuziasme akceptis kaj post plua diskuto oni nomis komitaton kaj rajtigis ĝin trovi kaj aĉeti taŭgan lokon por la konservado de la tutmonda oro.

Post nelonga tempo la komitato elektis insulon meze de Pacifiko, tie konstruigis imponan palacon kun forte kirasitaj salonegoj, kaj tiujn ejojn dividis inter ĉiuj orposedantaj landoj. Sekve, kiam unu lando bezonis transdoni, ni diru, dudek milionojn al alia lando, necesis nur transporti ĝin kelkajn metrojn el unu sekurloko en alian.

Kelkaj jaroj pasis kontentige ĝis denove iuj komitatanoj atentigis, ke eĉ tiu ĉi metodo estas malŝparema kaj ke por pligrandigi la efikon oni povos simple kunmeti la tutan oron en komunan ejon, kaj nur listigi la specifajn kvantojn en landaj kontlibroj por registri, kiom da oro apartenas al ĉiu aparta posedanto.

Ankaŭ tiu propono estis akceptita kaj poste la kontrolistoj ekzamenis

nur la kontlibrojn, listigis la orinventaron en la komuna trezorejo kaj atestadis sian raporton.

Tiu procedo daŭris multajn jarojn kun la plena konsento kaj kontento de la registaroj de la mondo kaj la borsoj, ĝis . . .

Unu jaron, kiam la kontrolistoj vojaĝis al la insulo, ili trovis ĝin en tre stranga stato. Evidentiĝis, ke antaŭ kelkaj monatoj la insulo, kiu ŝajne havis vulkanan originon, suferis teruran tertremon. La tertremo disfendis la mezan parton de la insulo ĝuste en la loko kie lokiĝis la ortrezoro kaj pro la granda pezo de la konstruaĵo la tuta enhavo falegis en la kreitan abismon kaj malaperis.

La oro certe restis ĉe la insulo sed de tiu momento ĝi fariĝis nek videbla nek atingebla. Per ia miraklo la kontlibroj restis nedetruitaj kaj ili montris la precizan staton de la malaperinta oro rilate al posedado. La konsternitaj kontrolistoj ekzamenis la librojn, trovis la kontojn en perfekta orda kaj fine aranĝis kunsidon por decidi pri la posta agado. Longe daŭris la diskutado. Se ili malkaŝus la situacion al la financa mondo ili riskus malordigi la tutan valutomerkaton. Krom tio ili certe malhavirus siajn postenojn kiel kontrolistoj. Ili do fine decidis nenion publikigi, sed laŭkutime atesti la raporton kaj daŭrigi kiel antaŭe.

Ĉe la borsoj la bankistoj daŭre traktis pri aĉetado kaj vendado de oro, la valutoj variis, alĝustigis saldoj kaj ĉiuj estis tute kontentaj . . .

(Libere redonita en Esperanto laŭ artikolo en "Statistical Review", kun permeso de ties redaktoro.)

Silenti kaj Paroli

de **D-ro J. C. A. Fetter**

oratoro ĉe **Nederlanda Radio**

DUM la elsendo de la lasta cerbogimnastiko oni faris i.a. jenan demandon: “Ĉu vi povas nomi tri nederlandajn proverbojn, en kiuj troviĝas la metalo oro?”; kaj tuj venis la respondo: “Matena horo estas plena de oro; ne ĉio kio brilas estas oro; paroli estas arĝento, silenti estas oro”. Pri tiu lasta esprimo mi ekmeditis.

Aŭskultantoj, ekzistas mistika silentado, kiun oni tre alte taksas en ĉiuj religioj; estas silentado, en kiu finiĝas ĉiu preĝo. Interna silento povas pli unuigi nin kun la Eternulo ol la parolado aŭ balbutado de vortoj. “Amu la silenton en via interno”, diras la poeto Adama van Scheltema.

Ekzistas sankta silento, en kiu la homo sciante sin ligita al Dio, jam ne defendas sin kontraŭ tiuj, kiuj kalumnias kaj akuzas lin, ĉar tia silentado diras pli ol multe da vortoj. Tiamaniere Jesuo silentis antaŭ la tribunalo de la pastroj kaj kontraŭ la roma vicreĝo. Mi konas kortuŝan negran kanton, en kiu la figuro de la Savinto aperas sugestie antaŭ nian fantazion, kaj eble plej multe pro tio, ke oni diras de Jesuo, ke Li silentis, kaj silentis, kaj silentis.


Ekzistas preskaŭ sankta silento, aŭskultantoj, kiam unu homo atente aŭskultas la alian, kaj silentigas sin ĝis la alia estos finparolinta; kaj kiom malofta kaj liberiga estas ĉi tiu silenta aŭskultado. Ankaŭ preskaŭ sankta silento estas imagebla inter homoj, kiuj bonege komprenas unu la alian; plej ofte tio nur estas ebla post multaj interparoladoj.

Ekzistas regita silento, kiu apartenas al fortaj karakteroj. Kiom respektplene ni pensas pri tiuj, kiuj per sia karakterplena silentado dum la militaj jaroj perfidis nenion kaj neniun. Sed ankaŭ en la simpla ĉiutaga vivo ni trovas regitan silenton, kie oni ne elparolis tro rapidan vorton, ĝustatempe retenis nedecan ŝercon, englutis tro akran juĝon. Ho, certe, ofte silenti estas oro.

Sed, aŭskultantoj, kiel mallumo kontraŭ lumo staras kontraŭ tia silento alia: la silento rezultanta el malkuraĝeco. Kelkfoje oni devas defendi homon—kaj tuj, ne morgaŭ; morgaŭ estos tro malfrue. Kaj aŭskultantoj, ekzistas ankaŭ la silento en kiun vi povas envolvi vin kvazaŭ en mantelon, silento de fiereco kaj de senameco. Kiom paralizige efikas, kiam oni parolas pro bona afero, kaj renkontas nur glaciigan silenton. Kaj nenio estas pli malĝojiga ol tio ĉi; ke la delikateco kiu iam ekzistis inter homoj povas forgliti, jes eĉ ŝanĝiĝi en indiferecon pro tio ke oni ne ĝustatempe elparolis vorton de kompreno kaj pardono. Mi iris foje dum enterigo apud viro, de kiu mi sciis, ke li antaŭe estis tre bona amiko de la mortinto, sed ankaŭ, ke en la lastaj jaroj li malofte aŭ neniam renkontis lin. “Mi devus esti vizitinta lin”, tiu viro diris, “mi devus esti dirinta klare al li, ke ni ambaŭ kulpis, kiam ni disiris. Kial mi silentis, kiam mi devus paroli”?

Ĉar, aŭskultantoj, kelkfoje silenti estas malpli ol arĝento, kaj paroli estas oro.

Trad. Betsy Leopold.



Enigma Konkurso N-ro 75

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj.

N-ro 164 : Promeso ne satigas. Protagonisto, ranunkolacoj, observatorio, manifestacio, eksperimento, sekretariino, orientalista, nomenklatur, esperantisto, sentimentala, ambasadorejo, tragikomedio, impertinenta, gastigantino, antropologio, stereometrio.

N-ro 165 : Prunto amikon forpelas. Plastiko, relativa, ultimato, nikotino, trotuaro, optativo, akompani, monarkio, invalido, kapitano, oportuna, nominala, fianĉino, onobriko, radikala, patricio, eminenta, lampiono, abrikoto, simpatio.

N-ro 166 : Franko, kranio, lariko, rikano, korano, bronko, barono, angoro, marono, renomo, merino, rimedo, premio, prismo, sopiro, aspiro, kiraso, fiasko, fakiro, franko.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 71-a konkurso: S-ro F. M. Mulder (Ned.) 152, S-ro J. Soyeur (Belg.) 149, S-ro R. Iserentant (Belg.) 148p.

Enigmo N-ro 170 : La ĉi-subaj ses proverboj kaŝas sepan proverbon, konsistantan el ses vortoj. La unua vorto de la sepa proverbo troviĝas en la unua proverbo, la dua en la dua k.t.p. Kio estas la sepa proverbo? Ĉiu besto zorgas pri sia nesto. Ŝafo kalkulita ne estas savita. Tro kara aranĝo por malkara tagmanĝo. Kiu avidas pli bonan, perdas plej bezonan. Pli da bruoj ol da faroj. Pri havo najbara oni estas malavara.

Enigmo N-ro 171 : De peko kaj mizero estas plena la tero. Klopodu kaŝi tiun proverbon per ok diversaj novaj proverboj. La demando do prezentas ĝuste la malon de N-ro 170.

Enigmo N-ro 172 : Ĉevalira enigmo.


Formu el la literoj de ĉi tiu figuro du esprimojn, kiuj troviĝas en la proverbaro de D-ro Zamenhof. La dika litero **K** estas la komenclitero.

K	S	Z	D	N	R	G	O
U	S	E	A	A	U	N	O
Ŝ	O	Ĉ	A	H	U	N	R
E	O	E	I	O	T	L	O
N	L	R	O	N	K	O	G
L	N	S	S	A	N	T	A
O	A	Ŝ	N	E	U	R	Ŝ
O	I	N	R	O	O	V	S

de paĝo 61

en la Malnova Koncertsalono de la Foirejo. La Interkona Vespero kaj la Balo havos lokon en la salonoj de Hotelo Esplanade.

Statistiko: (ĝis 31 dec.) Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 8, Belgujo 2, Brazilo 1, Britujo 41, Danlando 12, Finnlando 3, Francujo 34, Germanujo 13, Hispanujo 1, Gvatemalo 1, Italujo 9, Izraelo 1, Jugoslavujo 256, Nederlando 7, Norvegujo 8, Portugalujo 1, Svedujo 46, Svislando 10, Turkujo 1, Usono 1. Sumo 458 el 22 landoj. (Pasintjare 406).



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso—kutime 1 horon.
Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vitorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m., 188m. I.M. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
	22.30–22.50	Valencia. 43m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Ĵaŭdo	07.35–07.40	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (6-II, 6-III, 17-IV). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Hilversum. London, 9-an de Februaro, de 9.00 ĝis 9.30 sur ondoj 298m. S-ino Jelly Koopmans-Schotanus, soprano, aŭdigos recitalon de kantoj kun Esperanta teksto; piano-akompano de S-ino P. v.d. Horst van Schevichaven. Programo: Schubert—Al la Muziko, La Tilio, La Truto; Mendelssohn—Per kantoj flugilhavaj; Löwe—La Horloĝo; Brahms—Mesaĝo, Iro al la karulino, Ho, Dolĉaj vangoj. Dankleteroj al N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando ebligis dissendon de aliaj tiaj programoj.

Hispana Radio. Ni ĝoje salutas la kreon de nova Esperantlingva elsendo per la stacio Valencia kaj sendas niajn bondezirojn al la viglaj iniciatintoj de ĉi tiu programo. Dankleteroj kaj materialo por la programo (diskoj, broŝuroj, prospektoj, gazetoj, k.t.p.) sendataj al la Programestro de Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.

Veteranoj. Jen reviziita listo de la veteranoj en la foto sur paĝo 343 (Decembro 1952).
1-a vico: Melo e Souza, F. Schwarz, A. T. Whitehead, Taylor, M. Lewin, F-ino M. Noll, S-ino Sletterød, S-ino Møller.
2-a vico: H. Sirk, Vasiljef, S-ino Faulkner, S-ino Hardaker, Giannellis, Sletterød, Dybing.
3-a vico: D. Kennedy, J. Stenström, Carlsson, Roome, Leslie, Andersen, Vasmoden, —.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 246

3-an de Januaro 1953

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de 1952, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de 1951 :

	1951	1952
Asociaj membroj	8849	10447
Individuaj membroj		
MJ 903		1056
MA 4570		3820
MS 286		526
Patronoj .. 16		10
DM 260		268
HM 59		58
	6094	5738
	14943	16185

JARLIBRO. La jarlibro estas nun presata kaj espereble eliros en la fino de Januaro. La jenaj informoj pri delegitoj ne troviĝas en ĝi.

DELEGITOJ

Aŭstralio

Plumpton, N.S.W. FD (Katolikismo) :
Pastro Sigismondo, O.F.M., Capuchin
Fathers.

Britujo

Purton (Wiltshire). D : F. Curtis, 4 New
Road, Purton, Swindon, Wilts. Tel :
Purton 228.
FD (Fervojoj) : La D.

Finnlando

Evijärvi. D : Akseli Kirsilä, Evijärvi pt.
Tel : 14.

Heinola. VD : E. Laitinen, Anjalankatu 8.
Tel : 2011.

Helsinki-Otaniemi. VD : R. J. Milton,
Teekkarikylä G 34. Tel : 10155.
FD (Lingvoj) : La VD.

Ylistaro. FD (Konstruado) : Aulo Minell,
Munakka, Viitikko.

Francujo

Bar-le-Duc (Meuse). D : E. Couperie,
77 bis rue de St. Mihiel.

Germanujo

Hauingen (17b). FD (Kristanismo) : H. H.
Urbat, Rechbergstr. 1.

Lohr/Main. D : W. Stockhausen, Weisenau
13. Tel : 21.
FD (Tekniko) : La D.

Jugoslavujo

Zagreb. VD : F-ino L. Boičić, Maksimirska
28. Tel : 23867.

Nov-Zelando

Wellington. FD (Juro) : F-ino S. Robson,
78 Parkvale Road, Karori. Tel : 76-461.

Svedujo

Umea. VD : I. Milsson, Brinkvägen 40.
Tel : 1625.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Coutinho, F-ino L. M., Belo Horizonte,
Brazilo

Melo Pimental, S-ro E. de, Vitoria de Santa
Antão, Brazilo

Silva, D-ro A., Rio de Janeiro, Brazilo

Andersson, F-ino D., Linköping, Svedujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952

525. Kempeneers, D-ro P., Bruxelles, Belgujo

526. Castel, S-ro H., Bruxelles, Belgujo

PATRONOJ 1953

4. Gueritte, S-ro T. J., Surbiton, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953

155. Geyer, S-ro C. J., Bilthoven, Nederlando

156. Postma, F-ino T., Rotterdam,
Nederlando

157. Sliggers, S-ro B. C., Amsterdam,
Nederlando

158. Roelofs, D-ro W. P., Soest, Nederlando

159. French, S-ro R. J., Bexley, Anglujo

160. Harris, S-ro F., Bath, Anglujo

161. Larking, S-ro S. H., London, Anglujo

162. Williams, S-ro N., Manchester, Anglujo

163. Wright, S-ro R. E. S., Sutton, Anglujo

164. Bohnert, S-ro R., Adenstedt,
Germanujo

165. Flick, S-ro W., Bad Salzufen,
Germanujo

166. Hieronymus, S-ro F., Hamburg,
Germanujo

167. Kreutzer, D-ro J., Frankfurt,
Germanujo

168. Michling, S-ro H., Hannover,
Germanujo

169. Michling, S-ino I., Hannover,
Germanujo

170. Raab, S-ro J. M., Nürnberg, Germanujo

171. Sandrock, S-ro O., Essen, Germanujo

172. Schuster, S-ro E. L., Wiesbaden, Germanujo
 173. Strauch, S-ro A., Bad Pyrmont, Germanujo
 174. Thalmaier, S-ro L., Gräfelfing, Germanujo
 175. Treude, D-ro W., München, Germanujo
 176. Fritsch, D-ro E., Clenze, Germanujo
 177. Almen, S-ro P., Hällefors, Svedujo
 178. Hakansson, S-ro H., Traryd, Svedujo
 179. Julin, S-ro T., Stockholm, Svedujo
 180. Mattsson, S-ro E., Stockholm, Svedujo
 181. Blid, S-ro A., Nynäshamn, Svedujo
 182. Gerdman, S-ro B., Stockholm, Svedujo
 183. Karlsson, S-ro E., Vilshult, Svedujo
 184. Allen-Smith, S-ro H. W., Watford, Anglujo
 185. Bevan, S-ro F. O., Farnborough, Anglujo
 186. Chinn, S-ro C. G., Welwyn Garden City, Anglujo
 187. Goulding, S-ro E. I., Woking, Anglujo
 188. Lane, S-ro E. G., Reading, Anglujo
 189. Mills, F-ino C., Manchester, Anglujo
 190. Perry, S-ino M. J., Herne Bay, Anglujo
 191. Watson, S-ro L. G., Greenford, Anglujo
 192. Prince, S-ro A., Letchworth, Anglujo
 193. Björne, S-ro K., Lidingö, Svedujo
 194. Sjöblom, F-ino E., Astorp, Svedujo
 195. Hattemer, S-ro H., Solothurn, Svislando
 196. Grütter, S-ino L., Samedan, Svislando
 197. Milsom, S-ro H., Harrow, Anglujo
 198. Boatman, S-ro D. P., Westcliff-on-Sea, Anglujo
 199. Wolff, F-ino H., San Francisco, Cal., Usono
 200. Dedieu, F-ino J., Toulouse, Francujo
 201. Leleu, F-ino L., Mulhouse, Francujo
 202. Motto, S-ro R., Arles, Francujo
 203. Feis, S-ro G., Altenwald, Saarlando
 204. Debrouwere, S-ro G., Kortrijk, Belgujo
 205. Degryse, S-ro A., Roeselare, Belgujo
 206. Impanis, F-ino M. R., Brussel, Belgujo
 207. Mooij, S-ro P. H., Brussel, Belgujo
 208. Roose, S-ro F., Brugge, Belgujo
 209. Ahlgren, S-ro A., Göteborg, Svedujo
 210. Fejde, S-ro M., Nässjö, Svedujo
 211. Sgroi, S-ro R., Catania, Italujo
 212. Taccani, D-ro L., Milano, Italujo
 213. Apcher, S-ino G., Meknés, Maroko
 214. Cuené, S-ro M., Meknés, Maroko
 215. Hug, S-ro Raymond, Casablanca, Maroko
 216. Hug, S-ro Roger, Casablanca, Maroko
 217. Knecht, S-ro F. P., Casablanca, Maroko
 218. Krippner, S-ro W., Erfoud, Maroko
 219. Tronchon, S-ro H., Casablanca, Maroko
 220. Cellier, S-ro P., Meknés, Maroko
 221. Chambers, S-ro J. W., Parkstone, Anglujo
 222. Laverick, S-ro A., Hetton-le-Hole, Anglujo
 223. Pearson, F-ino E. M., York, Anglujo
 224. Sly, S-ro K. A., Slough, Anglujo
 225. Lamb, S-ro W. R., Sydney, Aŭstralio
 226. Ahlin, S-ro E. V., Brovallen, Svedujo
 227. Gustafsson, S-ro K. E., Bergvik, Svedujo
 228. Gjuras, S-ro J., Varazdin, Jugoslavujo
 229. Salberg, S-ro E. E., Selce, Jugoslavujo
 230. Rossetti, S-ro R., Birmingham, Anglujo
 231. Pot, S-ro C., Slikkerveer, Nederlando
 232. Bloemendal, F-ino S. W., Lochem, Nederlando
 233. Slot, S-ro R., Zeist, Nederlando
 234. Wilgenhof, S-ro K., Beverwijk, Nederlando
 235. Halbedl, D-ro A., Knittelfeld, Aŭstrujo
 236. Höfert, S-ro F., Wien, Aŭstrujo
 237. Planck, F-ino M. L., Kitzbühel, Aŭstrujo
 238. de Jong, S-ro H., Umtata, Sud-Afriko
 239. Ploussu, S-ro A., Grenoble, Francujo
 240. Bourguignon, S-ro A., Lannemezan, Francujo
 241. Forgeau, S-ro J., La Rochelle, Francujo
 242. Friess, F-ino E., Paris, Francujo
 243. Eymin, S-ino S., Foumbot, Kameruno
 244. Eichholz, S-ro R., Gottingen, Germanujo
 245. Aleman Ruiz, D-ro A., Habana, Kubo
 246. Clarkson, S-ro R. J., Tauranga, Nov-Zelando
 247. Anderson, S-ro S., Kati Kati, Nov-Zelando
 248. Wright, S-ro W. T. H., Kati Kati, Nov-Zelando
 249. Rayner, S-ro R. W., Ruiru, Kenjo
 250. Van Gindertaelen, D-ro T., Mechelen, Belgujo
- DONACOJ.** C. F. T. Birch 5ŝ., E. C. Hilder 10ŝ., T. J. Gueritte 20ŝ., J. Marshall 2ŝ. 6p., D-ro W. Treude 8ŝ., F. Depreux 1ŝ., F-ino H. Wolff 7ŝ. 5p., F-ino N. Hanson 60ŝ.
- Sinceran dankon al ĉiu helpanto.**
- Salutoj.** Al ĉiu kiu sendis salutojn por Kristnasko kaj/aŭ bondezirojn por la Nova Jaro ni kore dankas kaj sincere recipokas.
- C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj ĝiaj pordegoj tute ne estos fermitaj tage (ĉar nokto ne ekzistos tie); kaj ili alportos en ĝin la gloron kaj la honoron de la nacioj. *Apok.* 21. 25-26.

Esperanto-klubo deziras interŝanĝi leterojn, poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. Skribu multnombro, respondo certa. Walter Semsch, Pihel 187, okr. NOVY BOR, Ĉeĥoslovakujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo. Sekretario: Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Supra Lernejo de Kinesiterapio, malfermata en Gvatemalo la 1-an de februaro, serĉas profesor(in)on diplomitan de Supera Instituto de Gimnastiko (Kinesisto, Fizioterapiisto) por instrui *praktikan* kurson de masaĝo, gimnastiko, k.t.p. Scipovo de hispana lingvo. Detalojn aerpoŝte al D-ro Jules Bonge, 4-a Avenida, no 5-04, Guatemala-Cd., Gvatemalo, Mezameriko.

Internacia Kultura Semajno, 3-10 Aŭgusto 1953 en Kultura Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkupono G. Odent, Lycée de LAON, Aisne, Francujo. Represo petata.

Moroj kaj kutimoj rilate al la morto. Studento deziras informon koncerne kutimojn pri la morto en ĉiuj landoj. Bonvolu skribi pri la socialaj, financaj kaj speciale kuriozaj kutimoj rilate al la morto, enterigo, kaj funebro en via lando. Angle aŭ Esperante. Respondo garantiata. S-ro Jim Osburn, Box 415, Memphis State College, MEMPHIS, Tenn., Usono.

Kultura Esperanto-Domo akceptos laŭeble de Junio ĝis Septembrofino ĉiulandajn esperantistojn. Eventuale iam ajn karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGE, M-et-L., Francujo. Represo petata.

Redaktoro de komerc reklamarta gazeto deziras interŝanĝi materialojn pri komerc-reklamo, ekz. afiŝojn, pamfletojn, kestetojn.

Resp. garantiata. S-ro Waki Seikiti, "La Presarto", Kitahama 4-55, Higasi-ku, OSAKA, Japanujo.

S-ro Erkki Tuomanen, Simolantie 6, LAPPEENRANTA, Finnlando, deziras poŝtmarkojn kun motivoj sporto, bestoj, kaj ŝipoj; sendos kompanse samvalorajn finnajn poŝtmarkojn.

Ges-roj Brownlee, 8 Westbourne Grove, HEXHAM, Northd., Anglujo volas kontakti alilandajn samideanojn, neangle parolantajn; celo reciproka gastigado feria kaj por-esperanta.

Bournemouth. Brita Kongreso. Pentekosto. Hotelkosto (komforta) tagnokto mezprezo 1 pundo inkluzive. Bournemouth estos belega en Majo kaj nia programo ĝuinda. Programo kaj aliĝilo, en Esperanto (sendu internacian respondkupanon) de **W. Laurie, 6 Marlborough Road, Bournemouth, Anglujo.**

Letervesperon okazigos Esperanta Fakoj de Lingua Club, calle Buensuceso 1, MANRESA (Barcelona), Hispanujo, je la 21a de februaro 1953. Volonte ni ricevos leterojn, pk. ilus. Ĉiun sendinton ni respondos per ilustrita priskribo de nia urbo.

La Olimpiada ludo Roli, prezentanta pacan batalon inter 25 Eŭropaj nacioj, gvidataj de 5 ludantoj aŭ malpli da personoj, unike bela ludplano kun 300 figuroj, intelekta, ne per ĵetkubetoj, facile ludebla, eldonata en 25 diversaj lingvoj kaj Esperanto, prezo proksimume 15 Dm. germ. aŭ samvalora valuto, aperos en marto. Ĉiu Esperantisto, societo aŭ grupo devas posedi ĝin. Agemaj pagokapablaj reprezentantoj ĉiulande serĉataj, per kiuj okazos la liverado. Mendu ĝin tuj de Herman Röllig, POCKING-WALDSTATT A 12/8, (13b) Kr. Griesbach (Bayern), Germanujo.

Interŝanĝas foto-diapositivojn (ordin./kolora), poŝt-stampojn de internaciaj kulturaj kongresoj, Anderegg-Gurtner, HORN, Bodensee, Svislando.

21-jara studento dez. kor. kun boat-, ski-sportistoj. Nepre respondos. S-ro Milan Kaleta, Devinska 215, BRATISLAVA, Ĉeĥoslovakujo.

Nova kaj tre alloga libro

LA ALASKA STAFETO

kaj

KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ

Originale verkitaj de

F. OMELKA

La supraj verkoj aperis unue kiel felietonoj en *Esperanto* 1949 kaj 1951
Ili nun aperis en libroformo, kun aldonitaj fotoj, skizo pri la aŭtoro
kaj plano de Alasko.

Formato 22 × 14.5 cm. 96 paĝoj. Prezo 6 ŝilingoj, afranko 4p.

Tole bindita kun bilda polvŝirmilo

Valora kaj utila libro por ĉiu estas
la nova tute reviziita eldono de

NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO

de

LOUIS BASTIEN, Akademiano

317 paĝa, bele presita kaj bindita. Prezo 12ŝ. 6p., afranko 6p.

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD., ANGLUJO

Mendu ĉe vialanda librovendejo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

